

Jean de La Fontaine

IFABILOJ

Traduko de Lucien Thèvenin

*Baso de
Boule*

Eldono de "KOMPRENI"
41, Rue des Tables Claudiennes
LYON (1er) France

De Lucien Thèvenin.

LA VANA KANTO

Versoj originalaj (Kompreni eldonisto).

Jean de La Fontaine

FAIBLOJ

Traduko de Lucien Thèvenin

Eldono de "KOMPRENI"
41, Rue des Tables Claudiennes
LYON (1er) France

El tiu eldono 20 ekzempleroj estis presitaj sur papero
« M.A.E. Alibaux » markitaj de A ĝis P

250 ekzempleroj presitaj sur papero « Moulin Vieux » kaj
numerotitaj kaj subskribitaj de la tradukisto de 1 ĝis 250.

La libroj markitaj ne estas vendeblaj.

La libroj numerotitaj estis rezervataj al la antaŭmendintoj.

Ĉiuj rajtoj rezervitaj.



LA FONTAINE (*La Fonten*)

..LA FONTAINE (Johano de) naskiĝis en Château-Thierry en 1621. Lia patro estis Intendanto de Fonloj kaj Arbaroj. Dum siaj infanjaroj, li estis tre ordinara bubo kaj nur kiam li atingis la aĝon de 22 jaroj, li ekinteresiĝis pri poezio. Lia patro trandonis al li sian oficon kaj samtempe lin edzigis. Sed La Fontaine, kies karaktero estis senzorgema, malatenĝis tuj sian edzinon kaj sian oficon por plene sin dediĉi al plezuroj kaj poezio.

..Ĉar kelkaj el liaj provoverketoj al ŝi plaĉis, la dukino de Bouillon lin gastigis en sia domo, kunveturis kun li al Parizo kaj deklaris sin ŝia protektantino. Ŝi nomis lin « Mia Fablaro ». Li havis kiel proteklantojn ankaŭ la superintendanton Fouquet, al kiu li restis fidela eĉ kiam tiu lasta senfavoriĝis eĉ la reĝo; Henrikinon de Anglujo, la princon de Condé kaj la dukon de Burgonjo; tamen lin neniam favoris Ludoviko la XIV-a. Li amikiĝis kun Racine, Molière, Boileau, la vojaĝanto Bernier kaj intimiĝis kun s-ino de La Fayette kaj s-ino de La Sablière. Li travivis dudek jarojn en la hejmo de tiu persono, senigite de ĉiaj materiaj vivzorgoj. Kiam s-ino de La Sablière rifugiĝis en monahinejon, s-ro d'Hervart invitis lin loĝi en lia domo. « Tien mi estis irona! », respondis la poeto kun kortuŝa naiveco.

La Franca Akademio lin akceptis en 1684.

Krom la Fabloj kaj la Fabeloj, li verkis ankaŭ elegiojn (el kiuj unu, pri la senfavoriĝo de Fouquet, estas admirinda), kelkajn komediojn (La Eŭnuko, La Firenzano, La sorĉa pokalo, k.a.), tri mitologiajn poemojn (Psiĥe, Adoniso, Filemono kaj Baŭciso), kelkajn baladojn kaj rondelojn. Ĉe sia vivfino li sin turnis al la religio pri kiu li ne tro zorgis ĝis tiam kaj detruis plurajn el siaj ankoraŭ neeldonitaj verkoj.

..Sed la ĉefa parto de lia relative abunda verkaro estas liaj Fabloj, kiujn li nomis mem: « Ampleksa komedio en cent diversaj aktoj ».

Li mortis en 1695.

El ĉiuj francaj klasikuloj de la XVII-a jarcento, Jean de La Fontaine estas la plej alloga kaj, kredeble, la plej pensiga. La fortan karakteron de Pierre Corneille li certe ne posedas kaj ne klopodas, kiel la prikantisto de herooj, tiaj pentri la homojn, kiaj ili devus esti. Krome, kvankam dum sia senzorga, iom skandala vivo li ofte amis kaj estis amata, li ne limigas la homajn interkonfliktojn al la nuraj amaferoj, kiel majstre faris la « dolĉa » Racine. Sprite-lerte li elvokas ĉiujn kontakto-punktojn, kiujn spertas la homoj en la socia kunvivado kaj el kaj pri ili liveras rezulton de filozofia meditatio, iom nuancita, sed ĉiam saĝa kaj justa, se foje-foje tro indulga laŭ la takso de tiuj puritanaj moralistoj, kiuj malakceptas la ironion, tiun superan formon de la kompato.

La verkaro de La Fontaine entenas sesdek-sep fabelojn, iom pli ol neprudajn, kaj precipe dekdu librojn de fabloj, entute ducent-dudek, kiujn li komencis eldoni nur kiam li estis 47-jara. Estas tiu dua parto de lia verkaro, kiu juste famigis La Fontaine kaj al lia nomo certigas senmortecon. El tiu ampleksa fablaro, nia ŝatata samideano Lucien Thévenin, la bone konata poeto, kies versaĵojn aprezis kaj aprezas la legantoj de unuarangaj esperantaj periodaĵoj (Esperanto Internacia, Literatura Mondo, Nia Gazeto, k.a.), elektis kaj tradukis sepdekon.

Lia elekto ignoris neniun el la plej elstaraj fabloj de nia poeto, kaj tial la nuna kolekto liveras majstran bildon pri la ĉarma, penetrema, fleksebla kaj moviĝema genio de nia aŭtoro.

Lia traduko... Nu, antaŭ ĉio mi devas rimarkigi ke La Fontaine, kiu estas la plej kerne franca el la francaj klasikuloj, estas ankaŭ la malplej facile tradukebla el ili.

Redoni samtempe kaj la draston de liaj rakontoj kaj la luksan familiarecon de liaj parolturnoj kaj la ĉarman liberon de liaj versoj, kiuj jen malpeze kuras, jen pompe etendiĝas, jen trafe densiĝas, jen saltas, jen flugas jen danças, konsistigas tre tre malfacilan taskon. Ĉu Lucien Thevenin ĝin ŝate plenumis? Mi kredas ke mi honeste povas respondi « Jes! ».

Lia Esperanta varianto ĉiam respektas la saltemajn ritmojn de la originalo ; la traduko ĉiam transdonas sendifekta la sukcon de la rakonto kaj ties temon ; ĉiam, aŭ preskaŭ ĉiam, la esperantaj terminoj kovras fidele, se ne sklave, la francajn esprimojn kaj fine neniam disperdiĝas la gusto de la salo nek la aromo de la pipro per kiuj La Fontaine spicis siajn moralafabojn. Jam plurfoje mi legis tradukprovojn pri tiu aŭ ĉi tiu fablo de La Fontaine : neniu el ili — almenaŭ laŭ tio, kion mi memoras, kaj mi ĝuas ne malfidelan memoron — sukcesis transdoni tiel bone kaj plene la karakterizojn de nia poeto, kiel la tradukoj de Lucien Thèvenin.

Ĉu mi tiru la atenton de la leganto al kelkaj pecoj de la nuna kolekto ? Ekzemple al « Cikado kaj formiko », « Korvo kaj vulpo », « Urborato kaj kamporato », la fama « Lupo kaj ŝafido » kiun sesjara lerneĵano jam parkeras ; la ironia « Vulpo kaj cikonio » ; la ĉiam aktuala satiro « Ranoj postulas reĝon » kaj la ne malpli aktuala, ho ve ! « Bestoj malsanaj pro pesto » ? Kial do ? Tia listo, kompreneble, ne rajtas esti limiga. Neniu el la fabloj, kiujn mi ne menciis ĉi-supre, malpli valoras ol la menciitaj. Ĉiuj senescepte, kaj tion mi diras trankvilanime, ĉiuj estas malfalsaj, aŭtentaj juveloj el oro kaj perloj...

Ni do povas, kaj devas, danki al Lucien Thèvenin, ĉar li metis en la manojn de la esperantistaro tiel bonan kaj fidindan La Fontaine-Antologion.

Georges AVRIL.

CIKADO KAJ FORMIKO

Post somero kaj kantad',
 La cikad',
Hejme plu nenion trovis,
Kiam norda vento blovis :
Ne troviĝis eĉ pecet'
De muŝet' aŭ de vermet',
Pro malsat', ĝi petis truda
Helpon al formik' apuda,
Prunton nur de ia grajn'
Por plu vivi kiel ajn
Ĝis sezono nova venos
Diris : « Tion vi reprenos
« Antaŭ varmo, besta fid',
« Kapitalon kun profit'. »
Estas ne formik' donema :
Jen manĝeto inter svarm'. —
« Kion faris vi dum varm' ?
Diris ĝi al best' pruntema. —
« Nokte, tage, kantis mi.
« Ĉu ne estas tio prava ? —
« Kantis vi, jen mi tre rava !
« Nu, dum vintro dancu vi.

KORVO KAJ VULPO

Magistro korv' sur arbo altsidanta,
 En sia bek' fromaĝon portis.
Magistro vulpo al' odor' flaranta,
 Tiele proksimume vortis :

« Saluton korva moŝto mia.
 « Senfine vi aspektas bela kaj gracia !
 « Se plie, via voĉo trilas
 « Agrable kiel plumoj brilas,
 Vi estas de Parbaro, la feniksa gasto.
 Je tiuj vortoj ekĝojegas korvo vanta ;
 Por montri voĉon sen prokrasto
 Malfermas larĝan bekon, jen rabaj' falanta.
 La vulpo kaptas ĝin kaj diras ĝi : « Kunulo,
 « Nu ekseiu ke flatulo
 « De la kredema aŭskultant' profitas
 « Ĉi tiu lecion', fromaĝon ja meritas.
 La korvo honta kaj konfuza
 Malfruis tro por ĵuri, ke ĝi estos ruza.



RANO VOLAS EGALI BOVON

Jen apud rano estis bovo,
Al ĝi, altkreska ĝi montriĝas.
La rano tiel granda sume kiel ovo,
Envia, etendiĝas, penas kaj ŝveliĝas
Por esti dika kiel la bestego ;
Dirante : « Vidu do, kolego ;
« Respondu ĉu sufiĉas mia grando tiel ?
— « Ne — Tiam mi atingis fine vin ? — Neniel.
— « Jen fine. — Ne alproksimiĝas vi. » Malforta
Sveliĝis ran' ĝis krevo morfa.
*En mondo, multaj homoj tiel stulte rolas :
Konstrui volus burĝoj kiel grandsinjoroj,
Princetoj agas per ambasadoroj.
Paĝiojn la markizoj volas.*

DU MULOJ

Du muloj marŝis ; unu per aven' ŝarĝita ;
L'impostan monon portis la alia.
Ĉi tiu, glora pro ŝarĝaĵo bela tia,
Ne volus kontraŭ multo esti senigita.
Per lerta paŝo ĝi vojiris,
Tintilon sian tintigante ;
Sed malamikoj alvenante,
Ĉar monon ili nur deziris,
Al mulo de la fisko tiu trupo saltas ;
La besto, pro l'atako haltas.
Kaj suferante sin defendas.
Pikita de la batoj, sopirante plendas.

- « Ne justa estas tio, diris ĝi, la mulo
 « Venanta post mi, kuras for de la danĝero,
 Kaj mi pereas pro sufero !
 « — *Amiko*; diris la kunulo,
 « *Ne ĉiam taŭgas esti alta oficisto* :
 « *Se kiel mi, vi servus nur al muelisto,*
 « *Ne malsanigus vin, rabisto..»*

LUPO KAJ HUNDO

- Nur ostojn, haŭton, havis lup' maldika,
 Ĉar hundoj bonan gardon faris
 Renkontis ĝi al dogo bela kaj fortika,
 Brilglata, grasa, kiu sur la voj' eraris.
 Sinjoro lupo tre dezirus
 Ataki ĝin kaj ĝin disŝirus ;
 Sed la batal' decidus sorton,
 Kaj la hundego havis forton
 Por sin defendi kaj sentime.
 Humile staras lup' proksime,
 Komencas ĝi paroli kun gratulo
 Pri diko kiun ĝi admiras.
 « Dependos nur de vi, belulo
 « Ke vi grasiĝu kiel mi, la hundo diras.
 « Arbaron lasu kun prudento :
 « Mizera estas via gento
 « Kaj malfeliĉa, kies stato
 « Malriĉa gvidas nur al morto pro malsato.
 « Por vi nenio certa ! vera, ne regalo !
 « Vi prenas ĉion per batalo !
 « Min sekvu, havos sorton multe vi, pli bonan
 « Mi kion devos fari ? diris lupo.

« Malgranda, diris hundo, estos la okupo :
 « Forpeli homon kunbastonan ;
 « Loĝantojn flati, plaĉi al dommasfro sia ;
 « Kompense, la salajro via
 « Konsistos el restaĵoj dolĉaj kaj senfinaj,
 « Kolombaj ostoj kaj kokinaj,
 « Sen diri pri karesdediĉo. »

La lupu kredas jam ke venis la feliĉo,
 Ĝin ploriganta pro moliĝo.

Sed vidis kolon de la hund' senharigita
 Kaj diris : « Kio estas tio ? — Ho nenio.

« La kolrimen' per kio estas mi ligita

« Sendube estas kaŭzo de vidata tio. —

« Ligita ! ĉu vi ne kuradas kun libero ?

« Ne ĉiam, sed ĉu gravas la afero ?

« Ĝi tiom gravas ke manĝaĵo ĉiu via,

« Neniul vere min altiras

« Kaj eĉ trezoron volus ne por prezo tia. »

Dirinte tion, lup' forkuris kaj plu iras.

BOVIDINO, KAPRINO KAJ [^]ŜAFINO ASOCIIGAS KUN LEONO

Kaprino, bovidin', ŝafino kun leono,

Fiera landsinjoro de l'proksima loko,

Asociigis dum antikva la epoko,

Por unuigi malprofiton kun la bono.

En retoj de kaprino estis cerv' kaptita ;

Ŝi tuj alvokas siajn kunasociulojn.

Leono per la ungoj faras la kalkulojn

Kaj diras : « Inter kvar ĝi estu dividita.

Laŭ tiom da porcioj cervon ĝi dispecas ;
 Alprenas por si la unuan kiel decas.
 « Ĝi devas esti mia, diras la sinjoro,
 « Ĉar estas mi leona reĝo :
 « Neniu dubis pri l'honoro.
 « La dua estas ankaŭ mia per la leĝo :
 « Laŭ ĝi, la rajto al pli forta apartenas.
 « Ĉar estas mi plej brava, mi la trian prenas.
 « Se iu el vi tuŝos al la kvara laste,
 « Ĝin mi sufokos senprokraste.

HIRUNDO KAJ BIRDETOJ

Hirundo multe lernis en vojaĝoj mondaj.
 Vidinte multe, oni
 Ja multe povas koni.
 Ĝi tiu antaŭdiris eĉ pri okazontaj
 Malgrandaj uraganoj ;
 Sciigis antaŭ kredo, ilin al ŝipanoj.
 Okazis kiam la kanabon oni semas
 Ke ĝin sur multan sulkon metis kamparulo.
 Ĝi diris al birdetoj : « Tio ne konvenas,
 « Kompatas mi al vi pro granda la danĝero
 « Kaj mi forirus por vivadi en angulo.
 « Ĉu vidas vi vojiri manon en aero ?
 « Kun rapideco tempo venos,
 « Kun la jetifa semo, la ruino,
 « Naskiĝos retoj kiuj vin ja prenos,
 « Kaptilo multa kaj maŝino
 « Mortigos tiam vin ĝis fino ;

- « Aŭ vin malliberigos tiam laŭ sezono ;
 « Pri kaĝ' atentu aŭ kaldrono !
 Hirundo volis do konsili :
 Min kredu, manĝu tiun semon.
 Birdetoj mokis la timemon :
 Sur kamp' tro multon trovis ili.
 Aperis kanabejo verde ;
- « Laŭ pecoj, diris la hirundo, vi forŝiru
 « Produkton malbenitan de la sem' aŭ iru
 « Al la perejo fina, certe.
- « Klaĉulo ! estis dir', profetas vi malbonon !
 « Laboron belan vi proponas !
 « Kaj mil personojn ni bezonas
 « Por senherbigi la kantonon.
 Post maturiĝo de l'kreskaĵo,
 Aldonis la hirundo : « Ĝi ne estas fide ;
 « Semaĉo kreskas ja rapide,
- « Sed ĉar ne kredis vi al mia profetaĵo,
 « Vi kiam vidis ke kamparo,
 « Kovrita estas kaj sen faro,
 « Kampuloj la tritikon lasas,
 « Kaj kontraŭ la birdetoj ĉasas,
 « Kaptiloj, retoj per allogo,
 « Malgrandajn birdojn tiam tiros,
 « Ne flugos vi de lok' al loko.
 « Sed hejme restos aŭ foriros,
 « Vi faru kiel gru', skolopo aŭ anaso,
 « Ĉar ne scipovas via raso
 « Flugadi kiel ni trans maro kaj dezerto,
 « Por 'a eltrov' de mond' alia ;
 « Alprenos tiam vi, decidon nur de certo.
 « Kaŝante zorge vin en tru' de muro ia.

La birdoj lacaj ne plu volis
Aŭskulti ĝin kaj pepis tiam,
Konfuze kiel faris la Trojanoj kiam
Kasandro plenda ekparolis.
Okazis malfeliĉ' por unuj kaj aliaj,
Kaj multan birdon per kaptilo oni prenis.
Instinkte aŭdas ni nur diron de la niaj,
Kaj kredas la malbonon kiam nur ĝi venis.

URBORATO KAJ KAMPORATO

Tre ĝentile, invitilon
Iam sendis urba rato,
Por finmanĝi hortulanon
Al kampara sia frato.

Sur tapiŝo de Turkujo,
Preta estis manĝilaro.
Oni pensos pri l'kondufo
Ĝoja de l'amika paro.

Bona estis la regalo :
La festen' perfekta estis ;
Sed manĝadon interrompis
Iu, dum amikoj festis.

Ĉe la pordo de la ĉambro,
Ĵen aŭdiĝas bruo ia :
Kaj la urborat' forkuras,
Sekvas ĝin kunulo ĝia.

Tuj la ratoj rekomencas
Kiam la bruin^t foriras ;
« Finu ni rostajon tutan,
La kunulo urba diras.

« Venos vi al mia hejmo.
Diris la kampul^t ; sufiĉe.
« Tie vi ne povos certe
« Kiel reĝo manĝi riĉe ;

« Sed nenio interrompas :
« Manĝas mi sen ia ĝeno.
« Do adiaŭ. *For plezuron*
« *Kie estas tim-veneno !*

LUPO KAJ SAFIDO^A

*Motivo estas bona se ĝin donas forto :
Ni montros ĝin per jena vorto :*

Safido pro soifo trinkis
El riverfluo akvan puron.
Alvenis lup^t serĉanta aventuron,
Kaj kiu tiun lokon, pro malsat^t, atingis.
« De vi, trinkajo mia estas nigrigita !
Ekkriis la kolera besto :
« Pro via tromaltimo, estos vi punifa.

- « Sinjoro, diris la ŝafido, ke Majesto
 « Ne senmotive ekkoleru ;
 « Sed ĝi prefere konsideru
 « Ke vere estas mi trinkanta
 « El flu' kuranta,
 « Je dudek paŝoj sub lok' ĝia ;
 « Kaj ke mi povas do neniel,
 « Trinkajon malpurigi tiel. —
- « Vi malpurigas ĝin ! Respondis best' rabia,
 « Konate vi kritikis min dum jar' pasinta.
 — « Ne eble ĉar mi estis jam ne naskiĝinta.
 « Nun mi nur suĉas al patrino mia.
 — « Se ne, ĝin faris frato via.
 — « Ne havas mi. — « Do iu familia ;
 « Ĉar paŝtistoj, vi kaj hundoj,
 « Mian famon vi aranĝas :
- « Mi scias ĝin ! Mi venĝos min sen cedo.
 Kaj tiam al arbaraj fundoj,
 Forportas lupo ĝin kaj manĝas,
 Sen kroma formo de procedo.

^ STELISTOJ KAJ AZENO

Batalis du ŝtelistoj por azen' rabita :
 Ĝin gardi volis unu, ĝin la dua vendi.
 Dum pugnobatalad' rapida,
 Kaj niaj batalantoj pensis sin defendi ;
 Ŝtelisto tria tien venas,
 Sinjoron Malklerulo prenas.

*Kelkfoje la azeno estas nur provinco,
Stelistoj estas tiu princo
Aŭ tiu, ĉu hungaro ĉu transsilvania
Du mi ne vidis sed montriĝis tria :
Sufiĉe ofte tiu speco staras.
Neniu la provincon ja militakiras :
Stelisto kvara venas kaj la pacon faras,
Kun la azeno li foriras.*

MORTO KAJ MALFELIĈULO^A

Malfeliĉulo petis al la morto
Ke helpu ĝi al sorto.
« Ho Morto ! diris li, vi ŝajnas tiel bela !
« Per via veno ĉesu mia sort' kruela !
La morto kredis ke alven' lin kontentigas,
Ĝi frapas ĉe la pordo, montras sin, eniras.
« Ho kion vidas mi ? Forigu ĝin ! li diras.
« Renkonto tia min timigas !
« Ho ! ne alproksimiĝu Morto ! sed foriru !

*Meceno estis hom' prudenta ;
Li diris iam : Oni faru min kriplulo
Aŭ podagrulo, senkrurulo, senbrakulo,
Mi vivas, do troviĝas mi pli ol kontenta.
Neniam venu, Morto ! Samon oni diru.*

MORTO KAJ ARBHAKISTO

Malriĉa arbhakist' kovrita de branĉaroj,
Sub pezo de la ŝarĝo kiel de la jaroj,
Per pezaj paŝoj marŝis kaj kurbite ĝemis,
Kaj por atingi la fumnigran domon penis.
Li fine laca pro penado kaj doloro,
Demetas faskon, pensas pri sort' malfeliĉa.
Li havis kiun ĝojon, de l'naskiĝa horo ?
Ĉu estas sur la tero iu pli malriĉa ?
Ne ĉiam pano kaj neniam la kvieto :
Infanoj kaj edzin' impostoj kaj rekruto,
La kreditoro, la servuto,
Kaj tiel, de malriĉ' li estas la portreto.
Li vokas morton. Tuj alvenas tiu gasto,
Demandas kion li deziras.
« Vi devus helpi min, li diras,
« Reŝarĝi lignon ; por vi estos ne prokrasto.

*Ĉion mort' kuracas vere ;
Sed ni gardu nian sorton,
Kaj suferu ni prefere.
Homoj motas : For la Morton !*

VULPO KAJ CIKONIO

Kunulo vulpo, ian tagon peton faris
Al la kunulo cikonio por tagmango.
Malgranda estis la regalo, sen arango.
La ĝentilulo nur preparis
Fluidan saŭcon ; vivis kiel avarulo.

Por doni tiun saŭcon, uzis ĝi teleron.
Per sia longa bek', ne povis preni eron
La cikonio dum elglulis tuj ruzulo.

Por venĝi sin pro tiu trompa faro,
La cikoni' invitis ĝin post tempo ia.
« Volonte, diris ĝi ; ĉar kun la amikaro

« Mi estas sencere monia.

Je la dirita hor' ĝi kure iris

Al dom' de gastiganto ĝia ;

Pri ĝentileco laŭde diris ;

Pri manĝo taŭge kuirita ;

Sin montris, kiel vulpoj, ĉefe apeŝita.

Ĝi ĝojis pro l'odoro de viand' metata

Laŭ etaj pecoj kaj bonguste supozata.

Uzata vaz' ĝin embarasis,

Kun longa kolo kaj mallarĝa aperturo.

La beko de la cikonio bone pasis ;

Sed la sinjora naz' ne estis laŭ mezuro.

Senmanĝe, al loĝejo sia ĝi revenis,

Hontema kiel vulpo kiun koko prenis,

Kun vost' premata kaj oreloj pendaj.

Trompuloj, por vi mi poemis ;

Pri samo estu vi atendaj.

KOKO KAJ PERLO

En la fero, koko iam,

Trovis perlon kaj ĝin portis

Al unua juvelisto.

Diris : « Pura ĝi aspektas ;

« Sed malgranda nur grenero

« Estus por mi pli konvena.

Malklerul' heredis iam
Manuskripton kaj ĝin portis
Al najbara la libristo.
Diris : « Bona ĝi aspektas ;
« Sed malgranda nur monero
« Estus por mi pli konvena ».

KRABROJ KAJ ABELOJ

Laŭ verk' montriĝas laboranto.

Mielĉelaroj trovis sin sen posedanto :
Kelkaj krabroj ilin petis,
Sed abeloj ne alcedis,
Ĝis oni petis vespon juĝi pri l'afero.
Trovegis ne facile kie kuŝas vero :
La atestantoj diris ke ĉe mielĉeloj,
Zumantaj iom longaj estis fluginsektoj
Kun brunaj korpoj tiaj ke al la abeloj
Similis ili ; sed de krabroj la aspektoj
Aperas samaj kaj la formoj,
La vespo povis nur akcepti la deklaron,
Certecon plian ĝi demandis al informoj,
Kaj ĝi aŭskultis formikaron.
La solvo estas malfacila :
« Ĉu estas tio ja utila ?
Abelo diris kun racio.
« De ses monatoj daŭras tiu instrukcio,
« Neniun faris ni progreson,
« Mielo dume difektiĝas
« Kaj devas nun juĝanto fini la proceson :
« De l'urso la lekad' sufiĉas.

« Sen tiaj kontraŭdiroj kaj sen tiaj klaĉoj,
 « Paperamasoj kaj skribaĉoj,
 « Laboru ni kaj krabroj, certe
 « Tuj oni juĝos kiujn scias tiom lerte
 « Konstrui per mielo ĉelon.
 Malakceptinte la proponon,
 La krabroj montris sian konon,
 Kaj vesp' al abelar' aljuĝis la mielon.

*Se ĉiam tian procesfinon Di' permesus,
 Se de la Turkoj oni uzus la metodon,
 Akceptus ni la simplan saĝon kiel kodon,
 Elspezi tiom ne necesus.
 Dum oni ŝtelas nin kaj manĝas,
 Nin per longaĵoj oni tedas
 Prenante ostron, ĉion la juĝist' aranĝas ;
 Nur konkon havas kiuj pledas.*

KVERKO KAJ KANO

De kverk' al kano, jen parolo
 Iama : « Vi ja rajtas plendi al naturo ;
 « Por vi plej peza ŝarĝo estas la regolo :
 « Venteto nur laŭ aventuro
 « Farante sulkojn sur tavolo
 « De akvo, klinas kapon vian ;
 « Dum mia frunt' simila al Kaŭkazo povas
 « Ne nur haltigi la ardecon sunradian
 « Sed moki venton kiu blovas.
 « Ventego, por vi, por mi nur zefir' aspektus.
 « Se vi naskiĝus sub la ŝirmo foliara
 « De mia krest' sur lok' najbara,
 « Ne tiom, battoj vin difektus :

« Mi kontraŭ fulmo vin protektus.
 « Sed vi plej ofte naske venas
 « Sur la malsekaj bordoj kie regas vento.
 « Naturo kontraŭ vi, sin tre maljuste tenas.
 — « Kompato via venas el helpema sento,
 Respondis la arbeto, « sed ne zorgu pri mi,
 « Mi devas ventojn malpli ol vi-timi ;
 « Fleksebla estas mi kaj tial ne rompiĝis,
 « La dorso via ne kliniĝis
 « Ankoraŭ sub la ventaj fortoj ;
 « Sed ni atendu iom. Tuj post tiuj vortoj
 Alkuras furioze de ĉiela fino,
 El plej teruraj, la infano
 Ĝis nun portita de la Nordo en la sino.
 Rezistas arb' fleksiĝas kano.
 Klopodojn, vento duobligas
 Ĝis fine ĝi elradikigas
 La kverkon kies kap' atingis ĝis ĉielo
 Kaj kies bazo tuŝis regnon de malhelo.



KUNSIDO DE RATOJ

La kato Rodilardo iam,
La ratojn tiel almilitis,
Ke ilin oni preskaŭ ne plu vidis
Entombigitaj ja por ĉiam.
Ceteraj ne kuraĝis lasi la mansardon
Ĉar ili povis ne foriĝi el malsato,
Kaj la mizera gento nomis Rodilardon
Diablo sed neniel kato.
Okazis ke la ĝentilulo
Serĉadis tiam pri edzino.
Dum ĝi bruege festis kun la sinjorino,
Kunvenis la ceteraj ratoj en angulo,
Pro tiu nuna nova stato.
Tuj la prudenta ĉefo donis la konsilon
Ke oni ligu ĉe la kolo de la kato,
Prefere frue ol malfrue, la tintilon ;
Kaj tiel, se ĝi ekmilitus
La ratoj averŝitaj al la tru' rapidus ;
Ke nur efikos tiu faro,
Aprobis sian ĉefon la konsilantaro :
Nenio devis tiel bone do efiki,
Nur estis malfacile la tintilon ligi.
Unua diris : « Mi ne agus tiel stulte »,
Alia : « Mi ne sciis. » Tiel, senrezulte
Disiris oni. Mi kunsidojn vidis,
Faritajn tiel, resti sen efikoj ;
Kunsidis ne la ratoj tiam, sed kunsidis
Monaĥoj kaj eĉ kanonikoj.
*Se temas nur pri la kritiko,
Konsilojn multaj homoj donas ;
Necesa estu la praktiko,
Neniu tiam sin proponas.*

LUPO PLEDAS KONTRAŬ VULPO ANTAŬ SIMIO

Pro ŝfelo plendis lupo, kaj pri tiu kulpo,
Riproĉis al najbara diboĉeta vulpo ;

Ĉi tiun vokis ĝi pri tio

Al tribunalo de simio,

Por pledi mem. Simio ne memoris
Ke por konfuza tia far' Temis laboris.

Sur sia juĝa loko la juĝisto ŝvitis.

Post la protestoj kaj diskutoj

Respondoj, krioj kaj disputoj,

Konante la malicon de la par' decidis :

« Amikoj, vin de longa tempo mi ĉre konas

« Vi estos ambaŭ monpunitaj, mi ordonas,

« Ĉar lupo sen motivo vera tamen plendis

« Kaj vulpo ŝtele malutilis aliulon. »

*Punante laŭ hazardo, la juĝist' pretendis
Ke ne eraros kondamnante malvirtulon.*

DU VIRBOVOJ KAJ RANO

Por la akir' de bovidino, du virbovoj

Batalis, kaj por reĝaj povoj.

En la kanejo ran' sopiris.

« Vi sentas kion ? iu diris

El la popolo kvakadanta.

Respondis ĝi : « Ĉu vi ne vidas
« Ke la batala fin' decidas
« Pri la ekzil' de bov' ; l'alia ĝin pelanta
« Okazos ke la kampojn devos ĝi forlasi ?
« Ĝi ne plu regos sur la floroj de l'herbejo,
« Al niaj marĉoj venos, regos sur kanejo.
« Ĝis fundo, per piedoj povos nin frakasi
« Jen unu, jen alian. Estos la destino
« Sufera, pro la sinjorino bovidino.

Ne estis tiu timo vana.
Virbovo en lageton iris,
Sin kaŝis en loĝejo rana ;
Kaj hore, dudek ĝi disŝiris.
Ve ! oni vidas ke etuloj

Suferis ĉiam pro stultaĵoj de granduloj.

BIRDO VUNDITA PER SAGO

Pafita per plumsago kiu portas morton,
Ĝemploris unu birdo la malgajan sorton,
Kaj diris suferante la doloron plian :
« Ĉu oni devas krei malfeliĉon sian !
« Kruela hom' vi tiras elflugiloj
« La plumojn por ke flugu tiuj mortigiloj !
« Ne moku nin, gentaĉo kiu ne kompatas :
« Okazas ofte al vi, sorto kiel nia.

*De Jafetidoj, ĉiam la duono ŝatas
Armilojn doni al alia.*

^

LEONO KAJ MUĜETO

« Foriru tera fek^o, malforta nur besteto !

Leono per ĉi tiu diro
Parolis iam al muĝeto.
Okazis tial, militiro.

« Ĉu pensas vi, respondis ĝi, ke reĝtitolo

« Timigas min per sia povo ?
« Pli forta ol vi estas bovo,
« Kaj ĝin mi gvidas laŭ la volo.
Apenaŭ tiel ĝi admonis
Kaj la batalon mem ordonis,
Herolde kaj heroe agas.
Unue ĝi malproksimiĝas,
Atendas, ĉe la kol' atakas
Leonon kiu frezeziĝas.

Okuloj ĝiaj fulmas, ŝaŭmas ĝia buŝo ;

Ĝi blekas, oni kaŝas sin en la proksimo :

Kaj tiu ĝenerala fimo
Kaŭzita estas nur de muŝo.

Centloke, nur malgranda besto faras vundon

Jen pikas ĉe la dorso, jen ĉe la mentono,

Eniras la nazegan fundon.

Plej furioza estas tiam la leono.

La kaŝa malamiko ridas pro kontento,

Ĉar la kolera besto povas nek per dento

Nek ungo, buĉi la muĝeton en la sango.

Kaj la leono malfeliĉa sin mem ŝiras ;

Ĝi ŝvingas sian voston ĉirkaŭ sia flanko,

Ĝi bafas la aeron kiu sole miras ;

Faligas ĝin kolero, laco kaj doloro

Kaj la batalon lasas la muĝet' kun gloro :

Per zumo, ĝian finon tiam ĝi decidas,

Kaj por sciigi venkon ĉien ĝi rapidas
Ĝis venas por ĝi la perejo,
En la kaptil' de araneo.

*Ĉu estos de ĉi tio la konklud' instrua ?
Plej gravaj malamikoj, laŭ afer' unua
La plej malgrandaj estas, kaj sciigas dua
Ke por malgranda nur afero
Pereas tiu foriĝinta el danĝero.*

LEONO KAJ RATO

*Helpema por aliaj oni devas esti :
Plej ofte pli malgranda estas bezonita.
Du fabloj povas pri ĉi tiu ver' afesti,
Tiom estas ĝi pruvita.*

Malsaĝe iom, el la tero,
Sub la piedojn de leono, saltis rato.
La vivon lasis je okazo de l'afero
Al ĝi, la reĝo de la bestoj pro kompatato.
Ne vana estis la bonfaro.
Ĉu iu kredus ke la bono
De rato servus al leono ?
Okazis tiam ke dum iro el arbaro,
Leono kaptis reta ŝnuro ;
Neniel taŭgis ĝiaj blekoj por forkuro.
Sinjoro rat' rapidis, nur mordetis maŝon ;
Disrompis tiel ĝi, la tutan laboraĵon.

*Pacienco kaj daŭreco
Pli prosperas ol forteco.*

KOLOMBO KAJ FORMIKO

De pli malgrandaj, venas la ekzemplo dua.

Kolombo trinkis el rivero klare flua,

Formiko tien falas pro kliniĝa gesto ;

En tiu oceano, naĝis tiu besto

Penante per atingi bordon, sed nur vane.

Kolombo por formiko, montris sin kompafa ;

En akvon, herba frunko estis tuj ĵetata,

Ĝi estis promontoro por alveni sane,

Kaj tiel la formik' sin savis.

Kampulo nudpieda tie malrapidas ;

Hazarde sur la ŝultro, li pafarkon havis.

Veneran birdon li ekvidas

Kaj ĝoje kredas ĝin jam en kaldrono lia.

Por pafi, dum preparas sin la vilaĝano,

Lin pikas besto ĉe kalkano.

La kapon turnas viro nia :

La birdo aŭdas lin, ekflugas kun rapido,

La vespermanĝo flugas kun ĝi for de vido :

Por spes' ne estos kolombido.

LEPORO KAJ RANOJ

Leporo en la hejmo revis

(Ĉar kion fari krom revadi en kaŝtruo ?)

Profunde, tiun beston mordis la enuo ;

Malgaja estas ĝi kaj timon ĝi ricevis.

« Personoj timaj laŭ naturo,

« Nur esti malfeliĉaj povas !

« Trankvilon por manĝado, ili ja ne trovas.

« Ĝi diris : nur surprizoj estas, ne plezuro.

« Jen kiel vivas mi ; la timo malbenita
 « Dormigas min kun la okul' duonfermita.
 « Korektu vin, aldiras iu cerba saĝo
 « He ! ĉu kreigās la kuraĝo ?
 « Mi kredas eĉ laŭ la honoro
 « Ke homoj kiel mi sin gardas.
 Rezonas tiel la leporo,
 Kaj dume kaŝe ĝi rigardas.
 Ĝi estis duba, sen kvieto :
 Febrigis pro nenio ; ombro kaj bloveto,
 Kaj tiu best' melankolia
 Revante pri afero tia,
 Nur tre malgravan aŭdas bruon ;
 Ĝi estis la signal' por kuri en la truon.
 Por pasi, sur la bordo de laget' ĝi iris :
 Jen ranoj en la akvon tiam tuj saltantaj,
 Jen ranoj en profundajn grotojn enirantaj.
 « Ho ! okazigas mi, ĝi diris,
 « Al la aliaj, saman faron
 « Al mi okazigita ! Tiel
 « Aliaj timas min ! Alarmas mi fendaron :
 « Kuraĝon mi ricevis kiel ?
 « Mi miras ke la bestoj tremas antaŭ mi !
 « Ĉu militfulmo nun mi estas ?

*Sur tero, timemulo, tion mi atestas,
 Tre ofte trovas iun timan pli ol li.*

KOKO KAJ VULPO

- Sur arba branĉo sidis kiel gardsoldato,
Maljuna, ruza, lerta koko.
Per milda voĉo vulpo tiam diris : « Frato,
« Revenis paco sur la loko,
« Kaj plena paco tiun fojon.
« Sciigi venas mi kaj kisi vin pro tio :
« Ne plilongigu mian vojon ;
« Mi devas fari dudek haltojn nur hodiaŭ.
« Vi povos kaj aliaj same
« Sen timo iri al afero ;
« Ni vulpoj helpas vin fratame.
« Per lumoj festu dum vespero ;
« Kaj nun alvenu por ricevi
« La kison de fratamo mia !
« Amik' respondis koko, mi ne povis revi
« Sciigon tiel bonan kiel paco tia ;
« Kaj mi duoblan ĝojon sentas,
« Ĉar vi alportas ĝin. Sed venas kurieroj,
« Du leporhundoj kiujn certe por l'aferoj
« Oni sendas :
« Rapidas ili kaj alvenos post momento.
« Ni ĉiuj povos kisi, mi malsupreniras.
« Sed mia kuro estas longa, vulpo diras,
« Adiaŭ ! Ĝojos ni pri la interkonsento
« Alian fojon. » Tuj la ruza besto
Pro la malkontentiga gesto,
Preparas sian la forkuron.
Kaj nia koko en animo
Maljuna, ridis pri la timo ;

Trompulon trompi duobligas la plezuron.

KORVO VOLAS IMITI AGLON

Jupitra bird' forkaptas ŝafon en aeron,
Vidante korvo la aferon,
Ĝi, pli malforta, sed ŝatante tiom gluton,
Tuj volis provi tian faron.
Ĝi ĉirkaŭflugas la ŝafaron,
Kaj signas inter ŝafoj, grasan, belan bruton.
Buĉoferinda ŝaf' desline :
Por buŝo de la dioj estis ĝi rezervo.
La korvo diris, ĝin kovante per observo :
« Nutrinton vian konas mi ne,
« Sed via korpo ŝajnas al mi plej bonstata :
« Kaj por mi estos vimangaĵo.
Sur la blekulon tiam falas ĝi flugbata,
« Sed pezis ŝafa kreitaĵo
Pli ol fromaĝo kaj krom tio ĝia felo,
Densega estis ĝis ekstremo ;
Miksita proksimume laŭ la maniero
De l'hirta barb' de Polifemo.
La ungojn de la korvo tiel ĝi kroĉigis
Ke l'kompatinda besto ne forflugi povis.
Paŝtisto venis, ĝin senĝene enkaĝigis
Kaj kiel amuzilon al infanoj ŝovis.

Laŭ tiu trafa pruv' ni konu nian forlon.

Stelisto kiu rabas, trovas aĉan sorton.

Danĝeron, la imito vestas.

Ne ĉiuj hommanĝantoj, grandsinjoroj estas,

Kaj kie vespo pasis, la muŝeto restas.

LEONO KAJ AZENO ĈASAS^Δ

Decidis iam ĉasi reĝa besto :
Solenis datrevenon ĝi per tiu festo ;
Ĉasajo de leono estas ne pasero,
Sed belaj, bonaj apro, cervo, kapreolo.

Por ke sukcesu la afero
Ĝi turnis sin al la bonvolo
De best' kun voĉo de Stentoro,
Azeno kiu al sinjoro
Leono servus kiel voko.

Ĝi kaŝis ĝin sub branĉoj en postena loko,
Ordonis ke ĝi bleku, cerĉa ke pro l'sono
La malpli timigitaj kurus for de domo.

Kutimis ne ankoraŭ tiam la bestaro

Je voĉo kiu tondre blekis ;

Pro la terura bruo, la aero eĥis
Kaj kaptis la timemo, gastojn de l'arbaro ;
Forkuris ĉiuj kaj en la kaptilon venis,

Kaj la leono ilin prenis.

« Ĉu mi ne estis bona helpo je l'okazo ?

L'azeno diris tiam glora, pro la ĉaso

« Jes, la leon' respondis, bele ja blekita,

« Se mi ne sciis pri vi mem kaj via raso,

« Mi estus vere timigita.

L'azeno havis ne kuraĝon por kolero,

Pri tio oni mokus ĝin kun juĝo prava,

Ĉar kiu povus pensi pri azeno brava ?

Ne estas ĝia karaktero.

A RANOJ POSTULAS REĜON

La ranaro lacigata
Pro la stato demokrata,
Per protestoj tiom plendis

Ke al ĝi reĝan povon tuj Jupitero sendis.
Por ĝi, de la ĉielo falis reĝ' pacema :
Sed pro la falo estis bruo tiom larĝa
Ke la gento kvaka, marĉa,
Gento stulta kaj timema,
Kaŝis sin en akvo-fundo
Sub la junkoj kaj la kanoj,
En marĉara la profundo.

Kaj sen maltimo por rigardi estis ranoj,
De tiu nova grandegulo, la vizago.

Vere estis ligna bloko,
Kaj tiu grandegec' forigis la kuraĝon
De ran' por vidi ĝin, iranta for de loko,
Kaŝejo kava sia.

Tremante ĝi alproksimiĝis,
Ĝin sekvis dua, same faris la alia :
Formike la ranar' kuniĝis ;
Kaj fine, tiom estis tiu trup' facila
Ke sur la reĝan ŝultron estis ĝi saltanta.
Suferas reĝo tion, restas ĝi trankvila.
La kapo de Jupitero estas rompiĝanta,
« Ni volas reĝon movan, diras la popolo.
La ĉefo de la dioj, al ĝi gruon sendas,
Kiu mordas, boras, fendas,
Glutas ranojn laŭ la volo
Kaj denove ili plendas.

Jupiĉro diras : « Nu ! ĉu la deziro via
« Nin gardos sub leĝaro sia ?
« Unuan, vi akceptis staton
« Kaj devis gardi vian ŝtaton ;
« Sed ne farinte tiel, devis vi kompreni
« Ke taŭgas bona reĝo, dolĉa kaj sen movo.

*Vi estu do kontentaj kun ĉi tiu trovo,
Alia pli malbona povus ja alveni.*

VULPO KAJ KAPRO

Vojiris kapitano vulpo en kunesfo
De la amiko kapro plèj alĉkorna besto :
Ne vidis tiu lasta trans nazego sia ;
Plej sperta por trompado estis la alia.
Soifo kaŭzis ke en puton ili iris,
Kaj ĉiu ĝis kontento trinkas el la fundo.
Post kiam ambaŭ ĉerpis akvon en abundo :
« Nun kion faros ni ? la vulp' al kapro diris,
« Sufiĉas ne frinkad', eliri oni devu.
« Piedojn, kornojn same al la supro levu ;
« Apogu ilin kontraŭ muro kaj grimposte,
« Unue mi laŭ dorso via
« Sur viajn kornojn altiĝonte
« Per helpo de maŝino tia,
« El tiu loko mi eliros
« Kaj poste ankaŭ vin fortiros. —
« Per barbo ! Prava estas vi, la kapro diras ;
« Prudenton vian mi admiras.
« Trovinta estus mi neniam,
« Konfesas mi, sekreton tian.

La vulpo elputiĝas, lasas la alian,

Eldiras ĝi predikon sencan
Por fari kapron paciencon :
« Se la saĝeco estus por vi ĉieldono,
« Samkvante kiel barbo via ĉe l'mentono,
 « Ne estus malsuprenirinta
« Vi senpripense en la puton. Eliĝinta
« Mi estas. Faru same per klopodo salta ;
« Adiaŭ ! havas mi alion por aferi
« Ne permesanta ke sur voj' mi restu halta.

Pri ĉio oni devas finon konsideri.

LEONO VENKITA DE HOMO

Pentraĵo estis ĉe elmeto,
Kun desegnita la portreto
De plej altkreska virleono,
Venkita de nur unu homo.
Vidantoj sentis malhumilon.
Leon' pasante silentigis la babilon :
« Mi vidis efektive diris ĝi,
« Ke vi venkantaj estas tie ĉi :
 « Sed la artist' ne pentris vere ;
 « Por trompi, agis li libere :
« Por ni malsamaj tute estus rezultatoj
 « Se sciis pentri miaj fraĵoj.

LUPO KAJ CIKONIO

La lupoj manĝas plej avide.
El ili, unu dum ĝi festis,
Laŭ diro, manĝis tro rapide,
Profunde en la gorgo, unu osto ĝenis.

Feliĉe por la lupo, besto nun sen krio,
Proksime pasis cikonio.
Signis ĝi; la bird' alvenis,
Kaj tiu eklaboris je l'operacio.
La oston ĝi fortiris; por la bona ago,
Ĝi petis lupon pri la pago.
« La pago ! diris lupo nia.
« Ĉu mokas vi, kunulo mia ?
« Nu ! ĉu ne estas multe tiam
« Ke vi el mia gorgo, vian kolon tiru !
« Vi, maldankulo, tuj foriru :
« Sub mia ung' ne estu iam.



VULPO KAJ VINBEROJ

Gaskona vulpo, iuj diras Normanuja,
Malsata vidis sur branĉaro vinberuja
 Vinberojn kun matura belo,
 Kovrifajn per ruĝega ŝelo.
Volonte manĝus ilin, tiu ĝentilulo ;
 Sed ĉar tro alte ili pendis :
« Tro malmaturaj kaj nur taŭgaj por krudulo.
.....*Ĝi diris tiel kaj ne plendis !*

LUPOJ KAJ ^ΛSAFOJ

Post la miljara senkaŝeco de milito,
La lupoj faris packontrakton kun ŝafaro.
Versajne tio estis ĉies la profito ;
Ĉar se la lupoj manĝis multan vagan beston
Paŝtistoj per la feloj faris multan veston.
Neniam libereco, nek por la brutaro,
 Nek aliflanke por buĉtrupoj ;
Nur kun ektimo ili uzis la havaĵojn.
Por paco oni donis la garantiaĵojn ;
La hundojn donis ŝafoj, la lupidojn lupoj.
Farita estis laŭ kuĉima form' la ŝanĝo,
 Kun delegitoj por aranĝo.
Post kelka tempo la lupidoj faris juĝon
Ke ili estas lupoj kaj praktikos buĉon,
Okazon ili trovis kiam de gardloko,
 Forestis tuta paŝtistaro
Por kapti la ŝafidojn grasajn per sufoko,
Kaj porti ilin per la dentoj al arbaro.
Sekrete la kunuloj estis avertitaj
La hundoj pro certeco ripozantaj fide
 Dum dormo estis sufokitaj :

Apenaŭ sentis ĉar farita plej rapide.
Neniu kuris for, disiĝa estis ĉio.

*Konkludi povas ni el tio
Ke devas ni, militi kontraŭ malbonuloj
Ĉar paco estas bona stato,
Mi pensas, sed sen rezultato
Por malamikoj sen skrupuloj.*

A LEONO MALJUNIGINTA

Leon' teruro de l'barbaroj,
Malfortiĝinta sub la pezo de la jaroj,
En fino estis atakita de l'pregatoj
Nun fortaj pro l'perdita forto.
Alvenas la ĉeval', ĝin frapas per hufbatoj.
La bovo per kornpik' ; la lupo per dentmordo
La kompaŝinda best' malĝoja, lacigita,
Apenaŭ povas bleki, tempe kripligita.
Sen fari ian plendon, sorton ĝi atendas ;
Vidante eĉ azenon veni al la pordo :
Ĝi diras : estas tro, ne min timigas morto ;
Sed mi dufoje mortos se min vi ofendas.

BATALO DE RATOJ KAJ MUSTELOJ

La nacio de l'musteloj,
Kiel tiu de la katoj,
Bondeziras ne al ratoj ;
Kaj sen la mallarĝaj pordoj
De iliaj rifuĝejoj,
Besto kiu longaspektas

Dorse, farus mi suspektas
Tion, grandajn detruadojn.
Kiam ili estis multaj,
Tiam dum jartempo ia
Ratapono reĝ' ilia
Ekmilitis per armeo.
Siaflanke malfaldiĝis
La standardo de musteloj.
Estis por la venk' ŝanceloj,
Se la famon oni kredas :
Per la sang' de pli ol trupo
Estis pli ol kamp' fekunda.
Sed la perdo plej profunda
Falis preskaŭ ĉiuloke
Sur popolon de la raĵoj
Malgraŭ far' de Artarpakso,
Psikarpaks, Meridarpakso,
Plena estis la malvenko.
Polvkovritaj, tiuj ratoj,
Dum sufiĉa temp' subtenis
Batalantojn kiuj penis.
Vana estis kontraŭstaro ;
Ĉiu kun rapid' forkuris,
Devis cedi al la sorto :
Ĉiujn princojn trafis morto,
Kapitanojn kaj soldatojn.
Kanajlaro en la truoj
Pretan rifuĝejon havis,
Sin, sen granda peno savis ;
Sed sinjoroj, sur la kapo,
Ĉiu posedante plumojn
Kornojn, ankaŭ faskornamon,

Jen por signi sian famon,
Jen por ke la mustelaro
Havu tiel pli da timo,
Tio agis malfeliĉe.
Largaj estis nesufiĉe
Truo, fendo, sulk' por ili ;
Sed malsame, la gentaĉon
Ŝirmis plej malgranda truo.
Tiel ĉefa la detruo
Estis por la ĉefaj ratoj...

*Kapo plume ornamita
Estas granda embaraso.
Povas ofte por trapaso,
Tro belega vestaranĝo
Okazigi malfruigon.
Malgranduloj kun facile
Savas sin el la kaptilo :
La granduloj ne sukcesas.*

GAROLO KUN PAVA PLUMARO

Plumŝanĝis pav' ; garol' plumaron prenis
Ĝin uzis kiel propra vesto ;
Kaj inter pavoj, malhumile ĝi promenis
Kredante sin plej grava besto.
Rekonis iu ĝin, ĝi estis tuj mokita,
Batita kaj mistifikita ;
Kaj de la pavaj moŝtoj strange senigita ;
Eĉ rifuĝinte ĉe garoloj siaj fratoj,
De ili estis forpelita.

*Dupieduloj ofte kiel tiu estas,
Per la vestaĵoj de aliaj ja sin vestas
Kaj tiel estas plagiatoj.
Silentos mi ĉar mi ne volas malutili :
Koncernas tio nur al ili.*

VULPO KAJ BUSTO

Teatraj maskoj estas ofte potenculoj :
Monfriĝas ili respektindaj al simpluloj.
Laŭ kion oni vidas, juĝas la azeno ;
La vulpo juĝas nur post funda ekzameno,
Ĝi lurnas ilin zorge, tiam ĝi konstatas
Ke far' nur en mieno stafas,
Almetas vorton kiel faris ĝi kun ĝusto,
Juĝinte pri heroa busto.
Malplena estis tiu, granda pli ol normo.
La vulpo laŭdis al laboro kaj al formo ;
Ĝi diris : « Bela kapo sed cerbaĵ' nenia.
Kaj ofte grandsinjoro estas busto tia !

FISETO KAJ FISKAPTISTO

Grandiĝos la fiŝet' kondiĉe
Ke vivon donu Di' sufiĉe ;
Sed lasis ĝin foriri naĝe,
Ne estus nun konduĵi saĝe :
Rekapti ĝin, malĉerta estus la afero :

Kaptita estis ĉe la bordo de rivero,
 Fiŝeto kiu estis tiam nur karpido.
 La fiŝkaptisto diris tuj post tiu vido :
 « Valoras ĉiu karno por ke ni festenu ;
 « En nian sakon ni ĝin prenu.
 Laŭ propra manier', karpido malfeliĉa
 Rimarkis ke ĝi certe estus ne sufiĉa
 Por ke duone buŝ' pleniĝu :
 « Permesu do ke mi karpigu,
 « De vi mi estos rekaptita ;
 « Por esti kare, al potenca hom' vendita,
 « Dum vi ankoraŭ devus trafi
 « Cent fiŝojn kiel mi por havi
 « Manĝaĵon kiu povus certe ne vin ravi.
 — « Nu, estu tiel ! diris nia fiŝkaptisto ;
 « Amiko, bela fiŝ', samtempe predikisto,
 « Vi malgraŭ via diro, en la paton iros.
 « Hodiaŭ oni vin kuiros.

*Prefera estas dono ol promesa cedo ;
 Nur certa estas la posedo.*

SENVOSTA VULPO

Maljuna vulpo kaj trompema,
 Kuniklojn, kokojn sufokanta kaj manĝanta
 Ĝis mejlo vulpe odoranta,
 Kaptiĝis en kaptilo prema.
 Estante forkurinta per hazardo certa
 Ne tufa ĉar ĝi lasis voston garantie,

Kurinte tute honta, diras mi, de tie
Por havi similulojn (estis ĝi tre lerta),
Ĝi diris kiam vulpoj sidis ĉe kunveno :
« Ĉu vi bezonas tiun pezon sen konveno,
« Per kio balaigas ĉiu vojo kota ?
« Do kial tiu vosto ? Estu ĝi tranĉofa :
« Se oni kredas, ĉiu ĝin fortondos.
El trupo iu diris : « Bone parolata ;
« Sed montru vian dorson kaj ni tuj respondos.
Je tiuj vortoj, estis tia voĉ-eksplodo
Ke la senvosta vulp' ne estis aŭskultata.
Pretendi senvostiĝi estus temp' perdata.
Kaj tial daŭris plu la modo.

^A ĈEVALO KAJ LUPO

Jen lupo dum sezono kiam
Varmetaj la zefiroj herbon rejunigas,
Kaj bestoj el la propra domo sin forigas
Por iri serĉi nutron sian :
Post fino de la vintro, lupo mi rediras,
Ekvidis sur paŝteĵ' ĉevalon kiu iras.
Vi pensos kiel, pro kontento
Ĝi diris : « Bona karn' metinda sub la dento !
« Se nur vi estus ŝaf' vi estus tuj kaptato ;
« Sed ruzi devos mi por preni la ĉasajon.
Aldiris : « Mi do ruzu ; faris saĝan paŝon,
Lernanto ĝi de Hipokrato ;

Kapablojn kaj kvalitojn tiu best' konanfa

De tie ĉiu herb' kreskanta ;
Scianta, diras mi sen vanto

Kuraci ĉiujn vundojn. Se sinjor' Kuranto

Malkaŝe la malsanon diruŝ
Senpage lupo ĝin fortirus,
Ĉar sur herbejo vidi vere
Ĉevalon paŝti sin libere,

Laŭ medicino estas de malsan' atesto.

« Mi havas diris tiu besto
« Ŝvelaĵon sub piedo mia.

Respondis la doktor' : « Ne eŝas loko tia

« Por tiom doni la doloron.

« Kuraci Ĉevalmoŝton havas mi honoron,

« Mi faras ankaŭ ĥirurgion.

Por havi tempon, nia lupo diris tion

« Kaj kapti sian pacienton.

Sed tion suspektinte la alia ĵetas

Piedobaton kaj dismetas
Makzelon, ankaŭ ĉiun denton.

Jen bona leciono, devas lup' deklari

Ĉar ĉiu devas sian propran taskon fari.

Vi volas esti kuracisto

Kaj estos ĉiam nur buĉisto.

MONTO NASKAS

Naskonta monto suferanta

Per tiom laŭta voĉo kriis.

Ke ĉiu tien alkuranta,
Pri certa nasko opiniis
De urb' pli ol Parizo granda :
Nur muson naskis tiu monto.
Pri tiu fablo mi pensanta,
Mensogoplena laŭ rakonto
Kaj prava tamen laŭ la montro,
Mi vidas homon kiu vantas,
Dirante : « Mi militon kantas
« De la Titauoj kun la mastro de la tondro.

*Promeso bela, tamen ofte estas trovo
Nur blovo.*

KOKINO KUN OVOJ EL ORO

Volante gajni tro, avaro perdas ĉion.
Kaj montros mi por pruvi tion,
Nur tiun kun kokino, kiel fabl' atestas,
Faranta ĉiutage ovon ŝi el oro,
Troviĝis, kredis li, en ŝia korp' trezoro ;
Mortigas ŝin, malfermas ŝin, sed tie estas
La samo kiel en kokin' de simpla speco,
Li mem forigis propran fonton de riĉeco.

*Por avaruloj jen instruo
Utila. Lastatempe kiom oni vidis
El ili kiuj al la malriĉec' rapidis,
Volintaj esti riĉaj kun trofruo !*

AZENO PORTAS RELIKVOJN

Per relikvar' azen' ŝarĝata
Imagis esti adorata :
Fieris ĝi pro tiu penso,
Aceptis kiel por si kantojn kun incenso.
Vidinte la eraron, diris iu :
« Azena Moŝto, ne plu iluziu
« Per tiom vanta malhumilo
« Ne al vi sed al Di- simila
« Destinatas tiel sin, honoro,
« Al ĝi ŝuldata estas gloro.

*De malklerulo, magistrata
Nur robo estas salutata.*


SERPENTO KAJ FAJLILO

Najbar' de horloĝisto, iam laŭ rakonto,
Serpento (kaj ne taŭgas najbareco tia)
Eniris la butikon pro malsafo sia,
Por manĝi estis nur renkonto
De ŝalfajlilo kiun ĝi komencis mordi.
Sen ekkolero diris tiu instrumento :
« Vi faros kion ? ne scianta vi serpento !
« Ĉu pli malmolan ol vi, vi pretendas tordi ?
« Malgranda kapo sen prudento :
« Prefere ol de mi forporti,

« Nur la kvaronon de monero,
« Rompiĝus al vi ĉiu dento.
« Nur de la tempo venas por mi la danĝero.

*Spiritoj sen valor' instruos vin ĉi tio,
Vi volas ĉion mordi, taŭgaj por nenio :
Moviĝo via estas vanto.
Ĉu pensas vi ke dente me'os vi difektojn
Sur belajn tiom la objektojn ?
Por vi el bronzo, ŝtalo aŭ el diamanto.*

AGLO KAJ STRIGO



De aglo kaj de strigo la malpaco ĉesis,

Eĉ kisis unu la alian.

Kaj ili kiel reĝ' kaj kiel strig' promesis

Ke ili ne forglutus plu idaron ĉian.

« Ĉu konas vi la mian? diris striga besto.

Ne diris aglo. Ve! respondis bird' Minerva;

: Mi timas tiam por sekur' de mia nesto:

« Hazardo estos nur konserva,

« Ĉar reĝo estas vi, nek ion vi distingas,

« Nek iun ĉar vi reĝ' kaj dioj metas ĉion

« En saman la kategorion.

« Adiaŭ al idaro se vi ĝin atingas.

« Desegnu, diris agl' aŭ montru ilin tiam

« Kaj ilin tuŝos mi neniam.

« Faritaj bone, belaj pli ol la aliaj;

La strig' rediris: « Etaj estas idoj miaj,

« Per tiu signo vi tuj vidos ilin kone:

: Forgesu ne kaj ĝin memoru tiom bone,

« Ke ĉe min Parco malbenita

« Eniru ne, de vi helpita.

Al strigo Dio donis tiam naskitaĵon:

Vesperon belan, kiam serĉis ĝi kaptitaĵon.

Hazarde vidis aglo nia,

Ĉe truo de malmola roko

Aŭ de malnova domo ia

(Mi ne plu scias pri la loko),

Malgrandajn monstrojn tre malpláčajn,
 Malgajajn, eligante kriojn virinaćajn ;
 « Ne apartenas tiuj al amiko nia ;
 « Ni manĝu. Ĝentilulo agis sen reteno :
 Neniel estas ŝajna ja manĝado ĝia.
 La strigo trovis en la nesto post reveno,
 Piedojn de l'infanoj kiel nur bieno.
 Ĝi plendas kaj al dioj turnas sian preĝon
 Por puno de rabisto, kaŭzo de l'mortigo.
 « Kulpigu vin mem, iu diris al la strigo
 « Pli vere la komunan leĝon
 « Montranta similulon sian,
 « Faritan bone, belan, ĉefe kun afablo.
 « Infanojn vi priskribis tiel al la aglo :
 « Ĉu ili havis ŝajnon tian ?

KOKETO, KATO KAJ MUSIDO

Musido tute juna, ne spertinte iel,
 Trompita estis kaj jen kiel
 La aventuron ĝi rakontis al patrino :
 « Transiris mi la limajn montojn de la ŝtato
 « Kaj trotis kiel juna rato
 « Provanta vojon al destino,
 « Du bestoj tiam montris sin al vido mia.
 « Gracia, dolća la unua
 « Kaj moviĝema, malkvieta la alia ;
 « Kun voĉo kruda, akre brua,
 « Sur kapo ŝaras viandero,

- « Altigās tio kiel brako al aero,
 « Sendube por ekfluga fino,
 « La vosto kiel tufo estas dismetita.
 Koketo estis tiel priskribita
 De la musido al musino,
 Simile al flugbest' el lando malproksima,
 « Per brakoj batis ĝi la flankojn, ĝi aldiris,
 « Farante tian bruon kiam ĝi rondiris,
 « Ke, kvankam danke al la dioj, mi maltima
 « De ĝi forkuris mi, timante
 « Per tuta kor' ĝin malbenante.
 « Sen ĝi, mi estus ja ekkona
 « Kun tiu besto kiu ŝajnis tiel bona.
 « Ĝi estas kiel ni felglata,
 « Longvosta kiel ni, samsigna kaj humila,
 « Modesta laŭ rigardo, tamen okulbrila.
 « Mi kredas ĝin tre bonrilata
 « Kun rataj moŝtoj ; ĉar similajn laŭ figuro,
 « Orelojn ĝi posedas kiel gento nia ;
 « Venonta estis mi al ĝi, sed sono kria
 « Jetita de l'alia puŝis min por kuro. —
 Musino diris : « Filo, tiu dolĉa besto
 « Sub sia hipokrifa esto,
 « Nur estas kat' malbonintenca
 « Por ĉia via mus' parenca.
 « Sed la alia best' malsame
 « Ne agas kontraŭ ni malame.
 « Uzata estos eble ĝi por nia sato
 Kaj por la propra manĝo uzos nin la kato.

« *Vin gardu dum la tuta aĝo*

« *Prijuĝi gentojn laŭ vizaĝo.*

LEPORO KAJ TESTUDO

Ne kuro sed ekiro ĝustalempa gravas :
Por tio, la lepor' kaj la testud' atestas,
La lasta diris : « Vetu ni ke vi ne trafas
« La celon antaŭ mi. — Ĉu vi prudenta estas ?

Respondis facilanimulo ;
« Laksiĝi devus vi kunulo
« Per kvar heleborberoj kune.
— Mi vetas ; ĉu prudente ĉu ne.
Farite tiel ; devis oni
Ĉe celo la vetajon doni.
Ne gravas koni la objekton,
Nek de juĝonto la elekton.

Leporo nia devis nur kvar paŝojn iri,
Pri tiuj grandaj paŝoj, volas mi pridiri,
Farataj kiam ĝi trafota de hundaro
Kurigas ĝin sur la kamparo.

Havante tempon, herbon tondas ĝi per dento,
Ripozas, aŭdas kun atento
De kie ventas ; la testudon lasas

Kaj tiu, senatane pasas ;
Ekiras ĝi, klopodas fide
Kaj ĝi rapidas malrapide.

Malŝafas tamen tian venkon la leporo,
Por ĝi la vet' ne estas gloro,
Ĝi kredas ke por si honoro
Malfrue iri estas. Sur la herbo
Ĝi manĝas kaj el ĝia cerbo

La veto estas for. Kaj ĝi vidinte
Ke la alia estas preskaŭ ĉe la halto,
Ekiris kiel sago. Vana estis salto :
Testudo estis la unua alveninte.
« Nu ! kriis tiu best' ĉu mi ne estis prava ?
« Ĉu estas rapidiro grava ?
« Mi estas venka ! Kiel sortus
« Se vi leporo domon portus ?

SUNO KAJ RANOJ


Edziĝis reĝo ; tuta la popolo festis,
Dronigis zorgon en likvoro.
Ezopo pensis nur ke stultaj tiuj estis,
Monfrante tiom da humoro.
Rakontis la saĝul' ke iam, sun' pretendis
Kuniĝi je edzino.
Tuj oni aŭdis ke per sama voĉo plendis
La ranoj pri l' destino.
« Ni faros kion se naskigas ĝi infanojn ?
« Nin suferigis, al la Sorto diris ili,
« Nur unu suno, do se seso devos brili,
« La maron ĝi sekigos, same la maranojn,
« Adiaŭ ĵunkoj, marĉoj ; estos detruita
« La rana ras' kaj oni baldaŭ vidos
« Ke ĝi al Stiks rapidos.
De besto, tio estis bone pripensita.

LEONO MALSANA KAJ VULPO

La reĝo de la bestoj kiu
Malsana en kaverno plendis
Ordonon al vasaloj sendis,
Por ke la specoj venu ĉiu
Viziti lin per delegitoj,
Promesis ke akcepto bona,
Rezervas ĝi al la sendiĝoj,
Skribita estis fid' leona :
Pasporto taŭga kontraŭ dento
Kaj kontraŭ ungo same iĝas.
Edikto princa plenumiĝas :
Reprezentiĝis ĉiu gento.
Sed vulpoj ne el hejmo iris,
Kaj unu la motivon diris :

« La paŝoj sur la ter' signitaj
De tiuj kiuj flati malsanulon iras,
« Al la kaverno estas ĉiuj alturniĝaj ;
« Neniu la revenon diras ;
« Malfidon al ni, donas tio.
« Majesto gardu sian vokon :
« Pri la pasporfo, dankon Dio.
« Mi kredas al ĝi : sed en lokon
« Mi vidas kiel oni venas
« Kaj la eliron ne komprenas.

BESTOJ MALSANAJ PRO PESTO



Malsano kiu donas timon,
 Kaj kiun la ĉielkolero
 Eltrovis por, sur tero puni ĉiun krimon,
 La pesto, (ĉar nomigas tiel la afero)
 Kapabla pleni la inferon dum momento,
 Militis kontraŭ besta gento.
 Ne ĉiuj mortis, tamen ĉiuj malsaniĝis :
 Neniu besto okupiĝis
 Serĉante la subtenon por vivado plenda ;
 Neniu nutro estis tenta ;
 Nek kaŝobservis lup' nek vulpo
 Kaptajon dolĉan kaj sen kulpo ;
 Kolomboj kun rapid' foriris :
 Forestis am' kaj ĝojo kune.
 Leon' kunigis bestojn kaj al ili diris :
 « Mi kredas ke Ĉielo pune
 « Pro niaj pekoj sendis peston.
 « El ni la plej pekinta frato
 « Oferu sin al la ĉielkolera bato ;
 « Ricevos eble ĝi por ĉiuj, la boneston.
 « Ni sperte scias ke ĉe tiaj okazaĵoj,
 « Similaj estas sindonaĵoj.
 « Do, ne indulgu ni kaj juĝu ni sen flato
 « La konsciencon laŭ la stato.
 « Pri mi, kontentigante glutan apetiton,
 « Tre ofte manĝis mi ŝafidon
 « De mi neniel ofendanton ;
 « Eĉ mi kelkfoje manĝis, tion mi konfesas,
 « La paŝtanton.
 « Mi min oferas se necesas ;
 « Sed taŭgus, pensas mi, ke pekojn ĉiu vortu,
 « Ĉar dezirinde estas, laŭ plej ĝusta leĝo
 « Ke la plej kulpa el ni mortu.

- « Sinjor' vi estas, diris vulp' tro bona reĝo ;
 « Skrupuloj viaj montras tro delikatecon.
 « Nu ! Manĝi ŝafojn, kanajlaron, stultan specon,
 « Ĉu estas peko ? Ne, ne. Faris vi sinjoro,
 « Al ili multe da honoro ;
 « Kaj pri paŝtanta estas vero,
 « Ke li meritis ĉiun baton,
 « Ĉar estas li persono kiu kun himero
 « Sur bestoj trudas la regadon.
 La vulpo diris tiel, laŭdiŝ la flatuloj.
 Esploron fundan oni timis
 Pri tigro, urso aŭ aliaj potenculoj,
 Ĉar malpli pardoneble krimis,
 Eĉ simplaj hundoj, ĉiuj tiuj malpaculoj
 Laŭ dir' de ĉiu besto estis nur sanktuloj.
 Alvenis la azen' : « Memoras mi, ĝi diris
 « Ke sur herbejo mi vojiris,
 « Malsat', okazo, herbo mola,
 « Diablo ankaŭ min alĉiris,
 « Langlarĝan pecon el herbaro mi forŝiris.
 « Ne estis mia rajto, jen sincer' parola.
 « Azenon oni frapu ! » kriis tuj la trupo,
 Kaj pruvis per dirad', sufiĉe klera lupo,
 Ke estas fordoninda besto la malbena,
 Tondito, skabiulo, kaŭzo de l'malsano.
 Peketon oni juĝis, kazo por kondamno.
 « Ne propran herbon manĝi ! krimo abomena !
 « Nur morto estos pun' sufiĉa
 « Por tia grava pek'. Jen estis la postulo.

*Laŭ tio ke mizera estos vi aŭ riĉa,
 La juĝoj faros vin nigrulo aŭ blankulo.*

RATO FOR DE LA MONDO

Rakontas la Orientanoj,
Pri ia rato lacigita pro ĉikanoj,
Ke en fromaĝo nederlanda,
Ĝi kaŝis sin for de la mondo.
Soleco tie estis granda
Kaj regis ĉie en la rondo.
En tiu loko la ermito vivi povis.
Per ungoj, dentoj, tiom ŝiri,
Ke post mallonga temp' en ermitej' ĝi trovis
Mangaĵon kaj loĝejon : Kion plu deziri ?
Ĝi iĝis dika, grasa pro favoro Dia
Al fideluloj destinata.
Jen venis al persono pia,
Senditoj de la gento rata,
Por peti almozeton, ili tiel diras ;
Ĉar al fremdlando ili iras,
Serĉante ian helpon kontraŭ katpopolo
Pro la blokad' de Ratapolo :
Sen mono ili devis tiun kuron fari,
Pro la malbona mona ŝtato
De ties atakita ŝtato.
Malmulton ili petis ĉar por nur prepari
Helpaĵon, kvar, kvin tagoj estus temp' sufiĉa.
« Amikoj, estis la respondo
De la solul', « mi ne rilatas plu al mondo :
« Ĉu povas helpi vin ermito tre malriĉa ?
« Por ke Ĉiel' kompatu vin, mi preĝos Dion
« Kaj mi esperas ke pri vi li zorgos iom.
Dirinte tiun finan vorton,
La novsanktulo fermas pordon.

Laŭ vi, mi montras homon kian
Per rato tiom nehelpema ?
Monahon ? Ne, derviŝon ian ;
Car ĉiam, laŭ mi, montras sin monah' donema.

ARDEO

Arde' kun longa kolo adaptita, foje,
Kun longaj kruroj, longa beko iris voje,
Sen celo, borde de rivero

Kun klara akvo. Bona estis la vetero ;
Mil rondojn faris mia karmo sur la loko,
Kaj same la kunul' ezoko.

Facile la ardeo havus tuj profiton :
Al bordo venis fiŝoj ; estis nur bezone
Fiŝkapti, sed ĝi kredis bone
Atendi iom apetiton.

Dieton faris ĝi kaj manĝis laŭ la ordo.
Post kelka tempo ĝia apetito venis ;
Proksimiĝante al la bordo,

La birdo vidis tinkojn kiuj ekpromenis.
Atendis ĝi pli bonan nutron kaj trompita,
Por montri guston de malŝato,
Samkiel Horacia rato.

« Per tinkoj ! diris ĝi, mi estus do nutrita
« Per karno tia ! oni ja min kredas kion ?
Post la lasita tinko, trovis ĝi gobion,
« Ou estas por ardeo, gobiet' sufiĉa ?
« La bekon mi malfermos ne por fiŝo tia !

Por malpli ĝi malfermis ĝin. Okazis tiam
Ke venis fiŝo plu nenja.
Kaptita de malsato, estis ĝi feliĉa
Renkonti limakeŝon iam.

*Ni estu ne tro postulemaj ;
Plej lertaj estas tiuj ofte plej cedemaj :
Volante gajni tro, ni ofte perdas ĉion.
Malsatu tial ni, nenion.*

KORTEGO DE LEONO

Leona reĝo volis scii pri l'nacio
El kiu ĝi naskiĝis per la vol' de Dio.
Ordonis ĝi per delegitoj
Al ĉiuspecaj submetitoj,
Sendante al diversaj celoj
Sciigon skriban kun sigeloj
Rondiran. Diris la skribado
Ke l' reĝo havus dum monato
Kunsidon kies la soleno
Komenca estus grandfesteno,
Kaj poste ludus Fagoteno.
Per tiu trajto de grandeco,
Montrita al regatoj estis la poveco,
Ĝi ilin al palac' invitis,
La Luvro ! nur karnejo per odor' incitis
La nazon de la gastoj. Urso ŝtopis sian :
Ĝi farus tre volonte ne mienon tian ;

Malplaĉis la grimac'. Koleris reĝ- leono
Ĝi sendis urson montri naŭzon al Plufono.
Aprobis la simio multe la severon ;
Kaj per flafemo troa laŭdis ĝi koleron,
Kaj ungon de la princ', kavernon kun odoro :
 Sukceno estis nur kaj floro
Eĉ por la ajlo. La simia stulta flato
Malbone trafis kaj okazis sama bato :
 La leoneca potenculo
 Montriĝis kiel Kaligulo.
Al la tiea vulpo diris la Sinjoro :
« Senkaŝe diru al mi specon de l' odoro.
 Pretekston tuj alia trovas :
Ĝi grave malvarmumis ; ĝi sen flar' ne povas
 Konstaĵi ; lerte sin forŝovas.
 Al vi, ĉi tio vojon diras :

*Ne estu en korteg', se plaĉi vi deziras,
Nek mildflatululo nek sincera parolano
Kaj iam provu vi, respondi laŭ Normano.*

KATO, MUSTELO KAJ KUNIKLIDO

Palacon de kuniklo juna,
Mustel' alprenis dum foresto
De l'mastro. Por la ruza besto,
Konstatu ke l' afero estis oportuna.
La hejmon ĝi eniris, unu fruan horon
Dum kio, ĝi vizitis ame la Aŭroron
Sur roso kaj sur timiano.
Post kiam ĝi manĝetis, trotis, ronde iris,
Revenis subterhejmon, kuniklid' Johano.
Mustelo, sian nazon el fenestro tiris :
« Gastemaj dioj ! kion vidas mi ĉi tie ?
La forpelito de la hejmo, diris krie.
« Ho he ! Sinjoro musteleto,
« Eksteren kuru sen trumpeto,
« Aŭ mi avertos ĉiujn ratojn en la rondo.
Respondis la sinjor' pintnaza ke la mondo
Al la unua okupanto apartenas :
« Ĉu povas esti militfonto,
« Loĝejo kien ĝi mem nur rampante venas ?
« Kaj kvankam estus ĝi de reĝo
« La lando, volus mi ekscii kiu leĝo
« Por ĉiam donis ĝin eterne
« Al fil' aŭ nev' Johan' de Petro aŭ Vilhelmo,
« Pli ol al Paŭl' aŭ al Mustel' mem.
Johano vokis la kuŝimon kaj uzadon :
« Iliaj leĝoj donis al mi mastrogradon
« De tiu loko ĉi, kaj ili de Simono
« Al Petro, poste, al mi Joĉjo faris donon.
« Unua okupant', ĉu saĝa kompromiso ?

« Do sen diskuto pli efika
 « Ni fidu, diris ĝi, al Raminagrobiso.
 Ĝi estis kat' vivanta kiel pi-ermito,
 Kun katmieno hipokrita,
 Sanktulo-kato, grasa, kaj kun felo dika,
 Fidinda, sperfa pri ĉikano.
 Akceptas juĝon do, Johano.
 Jen alveninta ĉiu besto
 Ĝis antaŭ ĝia Felmajesto.

« Alproksimiĝu, diris Gripminald', infanoj.
 « La aĝo min surdigis, staru pli proksime.
 Alproksimiĝis ambaŭ ĝis la kat' sentime.
 Tuj kiam apud si, ĝi la pledantojn vidis
 Gripeminaldo hipokrite
 Etendis brakojn ambaŭ-flanken kaj subite
 Mangante ilin, al konsento bestojn gvidis.

*Similas multe tio ĉi al la debatoj
 De monarĥetoj sin turnantaj al magnatoj.*

KAPO KAJ VOSTO DE SERPENTO

Partojn du, serpento havas
 Kiuj malamikas homon,
 Ambaŭ : kapo, vosto gravas
 Kaj akiris faman nomon
 Ĉe la Parcaj sen kompatato :
 Tiel, infer ili iam
 Estis granda la kverelo
 Pri l'irado.

Ĝis tiam kapo marŝis antaŭ vosto ĉiam.

Vosto plendis al Ĉielo,

Al ĝi diris :

Mi multegajn mejlojn iris

Kiel tiu ĉi deziris :

« Ĉu kredas ĝi ke ĉiam uzos min la samo,

« Kiel simplan nur servanton ?

« Faris min ĉiela amo,

« Fraton, ne akompananton.

« Ambaŭ samaj laŭ deveno,

« Uzu nin sammaniere :

« Kiel ĝi, mi portas vere

« Rapidpovon de veneno.

« Fine, devas vi ordoni

« Kiel estas mia peto :

« Ke min lasu iri oni

« Antaŭ mia kaprafeto.

« Tiel bone mi ĝin gvidos

« Ke sen plendoj oni fidos.

Kruele la Ĉiel' akceptis la proponon.

Komplezo okazigas ofte nur malbonon.

Ĝi kontraŭ blindaj voloĵ devus agi surde.

Ne tiel agis ĝi ; kaj kiu nove gvidis,

Tiu en taglumo vidis

Ne pli ol en forno multe,

Frapis jen sur marmorajon,

Sur pasanton, sur plantajon ;

Al Stiksaj akvoj ĝi kondukis fraton sian.

Ve al falintaj ŝtatoj en eraron tian !

HOMO KAJ PULO

*La diojn tedas ni per petoj malnecesaj
Kaj ofte, eĉ por homoj, inda ne afero :
Ĉielo ŝajne devas ĉiujn ni sur ĉero
Rigardi kun atento kaj kun zorg' senĉesaj,
Kaj ŝajne plej malgranda el mortema raso,
Je ĉiu bagatelo aŭ farata paŝo,
Maltrankviligas Olimpion kun regnantoj,
Samkiel ili estus Grekoj kaj Trojanoj.*

Mordeĉis pulo iam ŝultron de stultulo
Loĝinte en la faldoj de littuko lia.
« Purigi devus vi, li diris al Herkulo,
« La teron je l'printempe reveninta hidro !
« En via nubo, kion faras vi Jupitro ?
« Por venĝi min, vi ne detruas rason tian ?
Li volis por mertigi pulon malutilan,
Ke dioj pruntedonu fulmon kaj frapilon.

RATO KAJ OSTRO

Prudenta nur malmulte, kamploĝanta rato
Sin sentis teda en la patra hejm' ĝis sato.
La kampon, grenon, pajlofaskon ĝi lasanta
Eliras el la truo, sur la land' ekiras.
Tuj kiam estas ĝi, de hejmo eliganta :

« Ho kiom granda, vasta estas mond' ! ĝi diras,
 « Jen staras Apenino, jen Kaŭkaz-montaro !
 Talpejo estas monto antaŭ rat-okulo.
 Post kelkaj tagoj, venas nia vojaĝulo
 Al ia sabla bordo kie lasis maro
 Multnombrajn ostrojn. Opinias rato, nia,
 Vidinte ilin ke ŝipegoj ili estis.
 Ĝi diris : « Kompatinda estis patro mia,
 « Sinjoro tima kiu hejme ĉiam restis !
 « Kontraŭe, vidis mi la maran imperion :
 « Dezertojn ni trairis sed ne trinkis tie.
 Per ia instruist' la rato konis tion
 Kaj tra kamparo diris ĉie,
 Ĉar ĝi ne estis rato libro-maĉetanta,
 Eĉ en la dentoj instruiĝa.
 El la fermitaj ostroj estis malfermita
 Nur unu, en sunlumo oscedanta,
 Ĝi ĝojis sub mildeco venta,
 Aeron flaris, spiris larĝa kaj kontenta,
 Grasblanka, kun aspekto de bongusto, tenta.
 Vidante tiam ostron el distanco, tiam
 La rato diris tuj : « Manĝaĵo tie staras
 « Kaj se pri la koloro mi ja ne eraras,
 « Hodiaŭ mi festenos bone aŭ neniam.
 Post tio, nia rato plena de espero,
 Alvenas ĝis la konko, kole plilongiĝas,
 Kaptita estas ĝi ĉar ostro refermiĝas
 Subite. Kaj jen kion faras la neklero.

Dufoje tiu fablo agas plej instrue :
En ĝi konstatas ni unue,
Ke tiuj kiuj mondan sperton ne akiras,
Pri aĵoj tre malgravaj miras :
Kaj oni estas sciigita
Ke estas la kaptont' kaptita.

RATO KAJ ELEFANTO

Okazas ofte en Francujo ke persono
Sin kredas grava homo role,
Kaj tiam estas burĝo sole.
Jen propra franca la malbono :
Vanteco stulta estas nia la afero ;
Hispanoj vantas per alia maniero :
Ilia malhumilo ŝajnas al mi multe
Pli forta sed fieras, ili malpli stulte
Ilustru ni fieron nian,
Valoras certe ĝi alian :
Rateto plej malgranda, elefanton vidis
Plej dikan, mokis ĝin ĉar iom malrapidis
La alta eminenta besto,
Marŝanta peze kun majesto.
Sur tiu besto trietaĝa
Troviĝis fama sultanino,
Kun hundo, kato, ŝimiino,
Kun ĉio al ŝi propra, eĉ papago klaĉa,

Al pilgrimejo ili iris.

Ke homoj estas, rato miris,

Tuŝitaj, rigardante tiun pezan blokon :

« Ĉu ke okupi pli aŭ malpi grandan lokon

« Nin farus pli aŭ malpli gravaj, ĝi aldiras,

« Sed homoj ! kion tiom vi en ĝi admiras ?

« Ĉu dikan korpon kiun la infanoj timas ?

« Ni, kvankam' tre malgrandaj, tamen nin estimas


« Ne malpli ol se estus kvanto.

Daŭrigus certe la diranto ;

Sed kato venis el kajuto

Kaj monfris al ĝi per nur gluto

Ke rat' ne estas elefanto.



KATO KAJ RATO

Kvar bestoj malsimilaj, ŝtelfromaĝa kato,
Malĝoja birdo, strigo, maŝmaĉema rato,
Mustel', korplonga sinjorino,
Kaj ĉiuj kun spirit' krimaĉa

Vizitis trunkon de malnova pin' sovaĝa.
Kaj tiel multfaj ke vesperon ĉirkaŭ pino
La homo streĉis retojn. Frue kat' eliris
Por serĉi kion ĝi deziris.

Pro la malhelo noktofina ĝi ne vidas
Kaptilon kaj al morta iras ĝi, danĝero ;
La kato krias kaj la rato tuj rapidas :
En unu ĝojo, en alia malespero ;
La rato vidas malamikon en la reto. —

- « Amiko, diras kat' kun peto,
- « La signoj de helpemo via
- « Ne mankas al la flanko mia ;
- « Min savu de kaptil' en kiun la nescio
- « Min logis. Mi kun pravo ĉiam
- « Vin sola inter via tuta familio,
- « Nur amis kiel amas mi okulon mian.
- « Mi ne bedaŭras tion, dankas al la dioj,
- « Mi kiel ĉiu pia kato,
- « Al ili preĝis dum matenaj sunradioj.
- « Retaro tenas nin sub via la kompato ;
- « Disigu tiujn nodojn. — Kiun mi donacon
- « Ricevos ? diris rato nia. —
- « Kun helpo mi promesas pacon
- « Eternan, ĵuris la alia.

« Disponu mian ungon, timu ne danĝeron :
 « Mi vin protektos kontraŭ ĉiu malamiko ;
 « Kaj mi formanĝos la mustelon
 « Kun edzo de la nokta strigo :
 « Malamas ili vin. Respondis rat' : stultulo !
 « Ke mi vin savu, mi ne estas malsaĝulo.
 Rifuĝi hejmon tiam provas.
 Mustelo apud tru' sin trovas.
 Pli alten, rato grimpas, tie strigon vidas.
 Danĝeroj ĉiuflanke, urĝo ĝin decidas.
 Reiras maŝmaĉul' al kato kaj ĝi penas
 Por rompi ligon kaj alian kaj ceteran,
 Hipokritulon malliberan
 Forligas. Homo tiam venas ;
 La novaj kunligitoj ambaŭ forrapidas.
 Post kelka temp' el malproksime vidis kato,
 La raton kiu vigle kaj singarde sidas,
 Kaj diris : « Venu kisi min, ho mia frato !
 « Singardo via min insultas :
 « Vi min observas kun malfido.
 « Memoras tamen kunligito,
 « Post Di' ke vivon al vi ŝuldas.
 Rediris rato : « Pri natura via sento
 « Memoras mi, sed ĉu konsento
 « Devigus katon al dankemo kaj redono ?

*Ĉu interligo estas bono
 Farita sole dum bezono ?*

TORONTO KAJ RIVERO

Kun krako kaj kun granda bruo,
Toronto falis de montaroj :
Timego sekvis ĝin ; balais ĝia fluo ;
Pro ĝi tremetis la kamparoj.
Ne volis ĉiuj vojaĝistoj,
Transiri baron kiu muĝis ;
Okazis tamen ke premita de rabistoj,
Sur la alian bordon iu vir' rifuĝis.
Ĝi estis nur minaco, bruo sen danĝero ;
Kaj timon nia viro sentis nur en vero.
Sukcesoj lin kuraĝigantaj
Kaj la rabistoj samaj, ĉiam lin pelantaj,
Renkontis li sub paŝo sia
Riveron kun aspekto tia,
De dormo tiom dolĉa, paca kaj trankvila
Ke la transiro ŝajnis al li tre facila :
Neniuj krutaj bordoĵoj, sablo tute pura.
Eniras li, kaj la ĉevalo
Lin savis de ŝtelistoj, ne de akv' terura ;
Kaj ambaŭ naĝis ĝis la falo
Por trinki en la Stiksa valo ;
Kaj en restej' malluma iris tra riveroj
Pli gravaj multe ol la niaj,

*De la senbruaĵ homoj venas la danĝeroj :
Ne estas tiel pri aliaj.*

DU KOLOMBOJ

Kolomba paro amon ĝuis.

En hejmo unu bird' enuis ;

Al malproksima land' malsaĝe

Foriri pensis ĝi vojaĝe.

« Vi faros kion ? dua diras ;

« Forlasi min ĉu vi deziras ?

« Foresto estas plej dolora ;

« Ne por vi kruelulo ! ĉar vojaĝ -arango,

« Danĝeroj, zorgoj kaj labora

« Prepar' por koro estas ŝanĝo.

« Se nur sezono estus baldaŭ finiĝonta !

« Ĉu iu pelas vin ? Atendu la zefiron,

« Al birdo, faris korvo aĉan antaŭdiron.

« Mi pensos pri kaptil' aŭ falk' al vi renkonta.

« Ve ! diros mi, pluvema estas la vetero :

« Ĉu mia frato havas ĉion laŭ la volo,

« Kun bona vespermanĝo, lito kaj cetero ?

Ekmovas la parolo,

La koron de la vojaĝonto malprudenta.

Sed venkis, scivolemo kaj vojaĝ-humoro.

Ĝi diris : « Ne eligu ploro,

« Tritagan flugon nur kaj estos mi kontenta :

« Revenos baldaŭ mi, detale al la frato

« Rakonti pri la rezultato ;

« Mi ĝin ĝojigos ĉar sen multe da konstato

« Malmulte oni povas diri.

« Kaj estos la vojaĝrakont' por vi plezuro.

« Mi diros : tie estis mi, jen l'aventuro :

Vi kredos tion mem admiru.

Post tiuj vortoj ili adiaŭon diras,

Kaj nia vojaĝonto malproksimen iras.

Pro pluvo devas ĝi rifuĝi ; ĝi elektas

Arbeton, tiel ke ventego ĝin difektas,

Ĉar foliaro ne sufiĉe ĝin protektas.

Vetero sereniĝas, malvarmigis tio,

Sekigas birdo sian korpon pluvkovritan,

En kampo vidas grenon dismetitan,

Kolombon apud ĝi : ĝin kaptas la envio ;

Ĝi flugas tien, sed sub tiu greno trompa

Per reto estas ĝi kaptita.

Feliĉe la kaptilo eluzita

Per beko kaj piedoj estas baldaŭ rompa

Ĝi perdis tie kelkajn plumojn kaj vulturo

Kun ungoj kruelegaj, sorto plej kompata

Ekvidis la malfeliĉulon kun la ŝnuro,

Peceto de la reto fortrenata,

Ĝi ŝajnis forkurinto el karcero.

Pretiĝis la vultur' ĝin premi al aero

Sed aglo kunflugilo streĉa falas.

« Oriras la kolombo dum la par' batalas,

Post fina flugo ĝi eksidas, ĉe domaĉo,

Ĝi kredas tiam ke finiĝis la plezuro

Per tiu lasta aventuro ;

Sed knabo petolema (senkompata aĝo)

Ĝin celis per ĵetilo kaj mortigis ŝtono
Malfeliĉulon ĝis duono ;

Scirolon sian la flugbest' malbenis
Flugilon kaj piedon trenis,
Duone lama kaj malsata,
Senhalte hejmen ĝi revenis :
Jen bone, jen malbone penis,
Sen aventuro pli malsaĝa.

Jen birdoj kuniĝintaj ; povas vi imagi
Ke ĝojo, de l'ĉagreno estis reciproko.
Feliĉaj geamantoj ĉu vi volas vagi ?

Ĝin faru al proksima loko.

Nur reciproke bela estu la afero,
Malsama ĉiam, nova ĉiam ;

Vi estu ĉio, kaj nenio la cetero.

Kelkfoje amis mi : sed mi ne ŝanĝus tiam

Por Luvro kun trezoro bela,

Por firmamento kaj por ĝia volb' ĉiela,

Arbarojn, lokojn honoritajn

Per paŝoj, kaj per la okuloj lumigitajn,

De pastistino malsevera,

Por kiu sub la fil' Kitera,

Mi servis jam ligita per promes' unua.

Ve ! ĉu revenos iam, tempo tiel ĝua ?

Ĉu tiom da objektoj dolĉaj, ĉarmaj lasis

Min vivi laŭ la vol' de l' koro moviĝanta ?

Ĉu por mi ne plu estas sorĉo haltiĝanta ?

Ĉu por mi, l' amotempo pasis ?

MILVO KAJ NAJTINGALO

Post milvo, tiu bird' ŝtelisto sendiskufa,

Disigis timon sur ĉirkaŭa lando tuta,

Kriigis sur sin en vilaĝo, la infanoj,

Trovigis najtingalo, ve ! sub ĝiaj manoj.

Heroo de l' printempo, vivon al ĝi petas.

« Ne manĝos vi el kio sonon nur posedas ?

« Prefere aŭdu kanton mian :

« Tereon mi rakontos kaj envion lian. —

« Tere' ĉu estas ĝi mangaj' por mia klano ?

« Ne ; tiu estas reĝo kies forta flamo

« Sentigis al mi sian ardon krimkruelan.

« Pri li eldiras mi kantaĵon tiel belan,

« Ke mia, ravos vin, kantado admirata.

La milvo tiam ĝin respondas :

« Afero bona ! kiam estas mi malsata,

« Vi al mi pri muzik' rakontas ! —

« Al reĝoj mi rakontas. — Kiam reĝ' vin prenos

« Vi tiujn mirindaĵojn temos :

« Por ili, milvo nur moksentas.

Malsata ventro ne atentas.

TESTUDO KAJ ANASOJ

Pro sia truo laciĝinta, kapfrivola
Testudo, por la landon vidi estis vola,
Volonte oni ŝatas landan malproksimon
Kaj por la hejm' lamuloj havas malestimon.

Sciigis belan la projekton,

Testudo al anasa paro

Konanta la rimedon por ĉi tiu faro :

« Ĉu larĝan vidas vi direkton ?

« Aere ni forportos vin en Amerikon :

« Vi vidos multan respublikon,

« Reĝlandon multan, genton multan; vi profitos

« Diversajn morojn kiujn vidos ;

« Uliso faris tiel » ; stranga la aludo

Al tiu homo en la ludo.

Testudo jesis la proponon.

Post la konsento, birdoj faris aparaton

Por porti pilgrimontan fraton.

Kaj oni metis al ĝi en la buŝ' bastonon.

Anasoj diris : Plej fortigu vian premon.

Kaj ĉiu prenas de l'bastono la ekstremon.

Jen en aer' testudo, ĉie oni miras,

Ĉar per rimedo tia iras

Malrapidulo kun domŝelo,

Portita ĝuste inter la anasa paro


« Miraklo ! oni kriis, pasas en ĉielo

« La reĝo de la testudaro. —

« La reĝo ! ja mi estas kaj ne moku tion,

Ĝi diris, sed prefera estus la prudento
Daŭrigi sian vojon ne dirante ion ;
La besto falas, kreas antaŭ rigardantoj
Ĉar tiam la bastonon lasis ĝia dento.
Pereon tian kaŭzis maldiskretaj vantoj.

*Scivolo vana, malprudento, malhumilo,
Vanteco stulta kaj babilo
Parencoj estas sen malpravo
Kaj nepoj de la sama avo.*



LUPO KAJ VULPO

Ezopo donas al la vulpo superecon,
Ĉu ĉar pli sperte ĝi praktikas la ruzecon ?
Mi serĉas, sed mi ne malkovras la motivon.
Ĉar kiam lupo devas gardi sian vivon,
 Aŭ aliulon ĝi atakas,
 Ĉu ĝi ne tiom sperte agas ?
Ĝi scias ŝajne pli kaj eble mi, sen kulpo
Maltime povos kontraŭdiri Majstron mian.
Okazis tamen ke doniĝis al la vulpo
Honoro, ĉar ekvidis ĝi vesperon ian
La lunon sur putfundo ; bildo rondiranta,
 Fromaĝon ŝajnis al ĝi granda,
 Kaj du siteloj laŭ alterno,
 Ĉerpadis akvon el interno ;
La vulpo kiel hund' puŝata de malsafo,
Sidiĝas alte en sitel' de l' aparato
 Tenata penda per la dua.
 Jen besto malsupreniĝanta
 Sukcese, tamen tre enua,
 Kaj la pereon ekvidanta ;
Ĉar kiel supreniri se kunul' malsata,
 De sama bildo allogata,

Kaj postvenanta en mizero,
 Per sama vojo ĝin ne savus el danĝero ?
 Neniu dum du fagoj al la puto iris
 Kaj dum du noktoj la marŝanta tempo ŝiris
 Laŭ la kutimo, el la sfera
 Vizago de la astro kun arĝenta frunto.
 Sinjoro vulpo estis malespera.
 Kunulo lupo, seka ĉe la fundo
 De gorĝo, pasas. La alia diras :
 « Regali vin per tiu rondo mi deziras.
 « Bongusta estas ĝi fromaĝo : donis Io
 « La lakton; faris ĝin Faŭn-dio,
 « Jupitro estus apeŝita,
 « Se li malsana povus palpi la nutraĵon.
 « Mi manĝis nur el ĝi ŝiraĵon :
 « Pri vi, sufiĉus ke vi manĝu la restaĵon.
 « Malsupreniru en sitel' por vi metita.
 Sed, kvankam ĝi plej bone diris la aferon,
 Malpravis lupo ĝin kredante :
 Malsupreniras ĝi, per pezo forportante
 Sinjoron vulpon sur la teron.

*Ni tion moku ne ; ĉar ofte kaj simile
 Malcerto tia nin altiras ;
 Kaj ĉiu kredas tre facile
 Jen kion timas, jen deziras.*

KANKRINO KAJ FILINO

Kelkfoje, kiel kankro, iras la saĝuloj
Returnen, kaj la dorson montras al haveno.
Ĉi estas artifiko, arto de maruloj :
De tiuj kiuj por protekti fortan penon,
Observas punkton kiu kontraŭdirektigas
Kaj kontraŭulon al ĉi tiu lok' kurigas.
Malgrava estas temo sed detalo granda :
Kaj povus mi apliki ĝin al konkeranta
Solulo, ligo kun cent kapoj malhelpante,
Entreprenante ion, ne entreprenante,
Unue nur sekrete, fine ĝin akiras.
Ne oni vidas kion kaŝi li deziras,
Ne povas bari ni, decidojn de la Sorto :
Ne trairebla fine, estas la torento.
Cent dioj estas por Jupitro nur malforto,
Fortrenas universon ŝajne en konsento,
Destin' kaj Ludovik'. Jen estas fablo nia.
Patrino kankra diris al filino sia :
« Ho bona Dio, kial vi ne rekte iras ?
« Ja, kiel vi marŝadas mem, filin' rediras :
« Ĉu mi ne marŝus laŭ metodoj familiaj ?
« Ĉu rekte iros mi dum tordas la aliaj ?

*Si estis prava. Estas povo
De ĉiu familia provo,
Universala kaj ekstaras
En bon', malbon', saĝulojn, malsaĝulojn faras,
Pli multe tiujn lastajn — Vojo estas bona
Turnante dorson al la celo, mi ripetas,
Precipe por meti' Belona ;
Sed kiam la momento pretas.*

AGLO KAJ PIGO

La pigo kun la aglo, reĝo de l'aero,
Malsamaj laŭ humoro, vesto, karaktero

Kaj diro sprita ;

Sur peco de herbej' travojis.

Hazard' kunigas ilin en angul' kaŝita.

La pigo timis, sed la aglo kin ĝojis,

Post bona manĝo trankviligis ĝin dirante :

« Ni iru kune, se la mastro de la dioj

« Enuas ofte, sur la univers' regante,

« Mi faru same, servas al li miaj scioj,

« Parolu do al mi kaj sen ceremonioj.

Ien tiam forta beko, plej rapida klaĉo,

Pri tio, pri ĉi tio kaj la babilaĉo

Malbona, bona de la viro Horacia

Sur kampoj, ne efikis kiel pigo nia.

Por diri ĉion okazontan sin proponas,

De lok' al loko salte iras,

Kaj Dio scias kiel bone ĝi spionas.

Malplaĉis la propon', kolere aglo diras :

« Amiko, klaĉo, forta beko,

« Forlasu ne la hejmon ĉar mi ne bezonas

« Babilemulon en kortego :

La pigo havas karakteron

Malbonan kaj ne petis pluan ĝi aferon.

Ne estas ĉiam bone ĉe la servo dia :

Honoro tia estas ofte nur angoroj ;

Spionoj, redirantoj kun mien' gracia

Sin montras malamindaj kun malsamaj koroj,

Eĉ se necese estas porti en la lokoj

Vestaĵojn, kiel portas pig', por du paroĥoj.

ALFABETA LISTO

Aglo kaj Pigo	82
Aglo kaj Strigo	49
Ardeo	60
Azeno portas relikvojn	48
Batalo de Ratoj kaj Musteloj	40
Bestoj malsanaj pro pesto	56
Birdo vundita per sago	27
Bovidino, Kaprino kaj Ŝafino asociiĝas kun Leono	13
Ĉevalo kaj lupo	45
Cikado kaj Formiko	9
Du Kolomboj	73
Du Muloj	11
Du Virbovoj kaj Rano	26
Fiŝeto kaj Fiŝkaptisto	43
Garolo kun pava plumaro	42
Hirundo kaj Birdetoj	14
Homo kaj Pulo	66
Kankrino kaj filino	81
Kapo kaj vosto de Serpento	64
Kaŝo kaj Rato	70
Kato, Mustelo kaj Kuniklido	63
Koketo, Kato kaj Musido	51
Kokino kun ovoj el oro	47
Koko kaj Perlo	21
Koko kaj Vulpo	32
Kolombo kaj Formiko	30
Kortego de Leono	61
Korvo kaj Vulpo	9
Korvo volas imiti Aglon	33
Krabroj kaj Abeloj	22
Kunsido de Ratoj	25
Kverko kaj Kano	22
Leono kaj Azeno ĉasas	34
Leono kaj Muŝeto	28
Leono kaj Rato	29

Leono maljuniginta	40
Leono malsana kaj Vulpo	55
Leono venkita de Homo	37
Leporo kaj Testudo	53
Leporo kaj Ranoj	30
Lupo kaj Cikonio	37
Lupo kaj Hundo	12
Lupo kaj Safido	17
Lupoj kaj Safoj	39
Lupo kaj Vulpo	79
Lupo pledas kontraŭ Vulpo antaŭ Simio	22
Milvo kaj Najtingalo	76
Morto kaj Arbhakisto	80
Morto kaj Malfeliĉulo	19
Monto naskas	46
Ranoj postulas Reĝon	35
Rano volas egali Bovon	11
Rato for de la mondo	59
Rato kaj Elefanto	68
Rato kaj Ostro	66
Senvosta Vulpo	44
Serpento kaj Fajlilo	48
Suno kaj Ranoj	54
Ŝtelistoj kaj Azeno	18
Testudo kaj du Anasoj	77
Torento kaj Rivero	72
Urborato kaj Kamporato	16
Vulpo kaj Busto	43
Vulpo kaj Cikonio	20
Vulpo kaj Kapro	36
Vulpo kaj Vinberoj	39

Finpresita la 30-an de Oktobro 1948

de « Imprimerie Centrale des Brotteaux », Lyon